

V - 19119/25 (1963)

MONATA ORGANO DE OOMOTO KAJ U.H.A. ★

Oomoto

1
9
6
3

Marto-Apr.

25-a Jaro N-ro 273-274 Administracio: Oomoto, KAMEOKA, Kioto-hu, Japanujo.
Abonprezo: ₡ 300 por unu jaro; \$ 1.20 aŭ 18 steloj por eksterlando: Abonebla
ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Japania Metropolo Tokio – Mondanigita

En la antaŭa numero ni jam anoncis, ke la 11-a Monda Kongreso de la Mondasocio de Mondfederalistoj okazos la ĉi-jaran someron en Tokio kaj Kioto. Ĉiuj preparoj por tio nun estas farataj.

La 26-an de februaro 1963 la 112-membra *Deputitaro de Metropolo Tokio* unuanime aprobis fari la Mondanigan Deklaron de la Metropolo. Kaj samdate la deklaro estis farita. Ĝi tekstas:

“Malebligi la okazon de tria mondmilito, forigi la plej malgrandan ombron da minaco de atommilito kaj efektiviigi la eternan pacon estas la forta komuna deziro de ĉiuj popoloj de la mondo. Ni, deputitaro de Metropolo Tokio, la ĉefurbo de tiu Japanujo, kiu spertis la hororon de la unuaj atombomboj kaj kiu pro la sperto povis formuli en sia konstitucio la ĉapitron senprecedencan en la mondo pri la rezigno je milito, deklaras al la mondo, ke ni, konforme al la celado de la Movado por Mondfederacio, strebos por la efektiviigo de eterna paco en kunlaboro kun ĉiuj popoloj de la tuta mondo.”

Ĝis nun 17 Prefektujoj (inkluzive nun Tokion) kaj 242 Urboj (vd. p. 41) estas mondanigitaj en Japanujo. Inter ili, Hiroŝima kaj Nagasaki, respektive mondanigitaj ne nur kiel la urbo sed ankaŭ kiel la prefektujo. Ankaŭ Kioto — same. Kaj nun la vico de Tokio kiel la metropolo.

La mondanigo de Tokio kun la 11,000,000 loĝantoj estas grava kaj signifoplena. Senbezzone diri, ke ĝi multe instigos ĉiujn aliajn malpli grandajn komunumojn al mondanigo kaj eventuale al la ŝtat-mondanigo de Japanujo.

Ni sincere petas al ĉiuj bonvolemaj samcelanoj kaj samideanoj sendi al la prefekto de Tokio gratulajn kaj kuraĝigajn leterojn en Esperanto, ĉar tio donos al li kaj ĉiuj aliaj gravaj personoj de la japana metropolo la okazon por vidi la praktikan “forton” de nia lingvo ĝuste antaŭ nia *Universala Kongreso en Tokio*. (Adresu: S-ro Rjutaro Azuma, Tokia Metropola Oficejo, Tokio, Japanujo).

Nova tempo bezonas novan homaron

OOMOTO aperis en oportuna momento por montri al la Homaro la rektan Vojon, kiu estas interne de ĉiu kreitaĵo. Mi konstatas, ke ili estas kiel torĉo lumiganta nian nunan malluman epokon! La aŭtoro

Levu la okulojn dum hela nokto, kaj pripensu pri la majesto de la Kreo. Mediteme rigardu tiujn stelojn, kiuj brilas kiel diafanaj diamantoj; komprenu ke ili estas grandegaj mondoj, kiuj iradas je miliardoj da kilometroj de la tero.

Pripensu tiam pri nia suna sistemo, kiu estas lumero en la Senfino, kun ĝiaj planedoj, ĉiam rondirantaj ĉirkaŭ Suno, kiu estas nur malgranda flamo inter la lumoj, kiujn ci vidas en la vastega spaco.

Observu la ritmon de la vivo: leviĝon kaj subiron de la suno, alfluon kaj forfluon de la maro, lunajn fazojn. Provu senti la signifon de tio. Rigardu mense ĉien, de la stelaj vastaĵoj ĝis nia suna sistemo kaj ĝis nia tero kun ĝiaj uloj, kreskaĵoj kaj ĉio, kio konsistigas ĝin.

Pripensu pri la majesto de la neĝaj montoj, la vivaj profundaĵoj de la arbaroj, la mallumaj kaj vivplenaj abismoj de la subakvaj profundoj. Kia grandega nombro da ekzistoj, eĉ en marĉeta akvoguto, kie mikroskopo montras vivajn estaĵojn inter kvazaŭ arbaroj de malgrandaj algoj. . .

Pripensu nun pri la ĵusaj sciencaj eltrovoj, kiuj pruvas al ni, ke

“materio” konsistas el etaj sunsistemoj (atomoj), kiuj formas kirlojn moviĝantajn de energio. . . mirindajn stelarojn treege malgrandajn. Sentu, nun, ke la suno kaj ĝiaj planedoj estas nur atomo en la Senlima Spaco.

Konsideru mense la tutan kreon, kaj profunde sentu tion, kion ĝi reprezentas: Senfinan Povon, kiu aperas laŭ miloj da manieroj en ĉiuj estuloj, en ĉiuj estaĵoj: senfina multeco de vivformoj, profunda unueco de la Povo, kiu animas ilin.

Efektive, estas nenio, eĉ sablero, eĉ atomo, kiu ne enhavas tiun mirindan Povon, kaj kiu ne estas aperigo de ĝi. Tiu Povo ne mezuras la spacon; la treege malgranda aĵo kaj la treege granda aĵo unuigas en similaj formoj; atomo, suna sistemo, spiralaj nebulozoj, ĉio estas regata, animata, de tiu sama Povo, kiu agas en la Universala Menso.

El kio devenas tia Universala Povo? Ne estas Povo aganta “per si mem”; estas Povo, kiu karakterizas la Superegan Eston, Unika Universala Esenca Spirito, el kiu ĉiuj ni estas agadaj spiritaĵoj. Tiu Esto aŭ Spirito senlima kaj senforma estas “neelĉerpebla fonto” senfina kaj eterna de ĉio pozitiva, kion ci povas

imagi: Amo, Belo, Saĝo, Abundo, Potenco, k.t.p. Ĉie, kie ci rimarkas majeston, noblon, povon, radiantan kaj agigantan fratecon Li estas kiu diras en ci mem: MI ESTAS, MI SCIAS, MI VOLAS; Li estas kiu diras: mia menso, mia korpo, estas la posedanto, tial Li ne povas diri mia spirito, ĉar li mem estas la viva spirito; tiel do, ci mem estas Spirito.

Oni povas konsideri homon, kiel malgrandan Universon. Tial la Universon oni nomas “Makrokosmo” (granda Universo), kaj la homon “Mikrokosmo” (malgranda Universo).

En la pasinta tempo, oni kredis, ke homo estas speco de besto, kiu havas animon. Nuntempe ni konstatas, ke homo estas unuaĵo de korpo kaj animo, en kiu estas kaj aperas la Universala Vivo sub la formo de “individua konscio”.

Sed la Universala aŭ Spirita Konscio ne esprimiĝas plenmaniere per homo; ĝi esprimiĝas kiel “homa konscio”. En la homo esprimiĝas la individua konscio laŭ diversaj sinsekvaj gradoj: homa (korpa) mensa kaj esenca (spirita).

Notu ke, komence kaj dumlonge, la Konscio esprimiĝas en homo, nur sub formo de “korpa homa konscio”. Pli poste, aperas la mensa konscio. Fine, la esenca aŭ spirita konscio manifestiĝas.

En la homa konscio, homo sentas sin korpo, homa formo. En la mensa konscio disvolviĝas kreopovaj eblecoj per kono de objektiva penso. En la Esenca aŭ Spirita Konscio, homo sin sentas ESTI la esenca centro “in-

dividuo”, kiu pensas kaj disvolvas en si la ideojn, kiujn li volas aperigi kaj esprimi tra sia materia korpo. Estas la “MIO” aŭ UNIVERSALA SPIRITA CENTRO, kiu scias, ke Li havas je sia dispono mensan kaj materian ilon por sin esprimi kaj sin manifesti.

Homo ne estas “vermo”, “kiu rampas sur la tero”, sed vera konscia estulo, kiu en la menso kaj en la fizika medio aperigas tion, kion li volas. Ci estas agada Centro de la Universala ESTO.

Kiam ci mediteme rigardas la Universon, kiel dirite, ci devas enpenetrigi en cia interno, pensante, sentante kaj dirante: EN MI ESTAS LA POVO KAJ LA SAĜO DE LA SENFINA SPIRITO DE LA UNIVERSALA ESTO, DE KIU MI ESTAS CENTRO DE AGADO.

Sciante kaj sentante, ke ci estas AGADSPIRITA CENTRO, ci estas kapabla por helpi al la nuna transformado de la mondo pere de cia pozitiva pensomaniere, ci povas fari la sekvantan mensan laboron: En trankvilo kaj koncentrado, imagu mondon perfekte belan, en kiu amo, bono, frateco regas ĉie, mondon en kiu ĝojo, feliĉego, abundo de ĉiuj specoj de bonaj aĵoj ekzistas por ĉiuj, senlime.

Rigardu, ke ĉiu estas plene sukcesanta kaj sana, animata de la sento de granda feliĉo.

Tiu mondo, kiun ci vidas tiele, ne estas produktaĵo de cia elsorĉita fantazio; estas la perfekta Mensa Mondo, kiun ci pli poste konos laŭ ĝia plena BELO.

Uzuro

Uzuro, vastasence, estas la ekspluatado de la urĝeco de bezonoj, de la malfacila situacio de la proksimulo, kaj de liaj nescio kaj senpripensoj. Laŭ senco strikta ĝi estas la elprofitado de la urĝeco de bezonoj kaj de la nescio kaj la senpripensoj de alia homo por elpostuli interezon kiu ne baziĝas sur leĝa titolo aŭ rajtigo, kaj tial devas esti rigardata kiel senrajta alproprigo al si de havaĵo aliula.

En antaŭaj tempoj oni rigardis ĉian interezopostulon kiel uzuron. Laŭ filozofoj kiel Platono, Aristotelo kaj Seneko, ĉia interezo estas malrajta, ĉar laŭ ili la mono ne estas fruktodona kaj rolu nur kiel interŝanĝilo. Ankaŭ en la Mezepoko la kristana eklezio malpermesis la interezon, ĉe tio ĉefe sin bazante sur Luko 6:35: "Pruntedonu ne esperante pri repago." kaj ankaŭ sur la instruo de Tomo de Akvino pri la *justa prezo*. Poste ankaŭ reformaciuloj — kiel Lutero — prenis la saman starpunkton, kaj ĝis la hodiaŭa tago la Islamo kondamnas la interezon.

La malpermesoj de la interezo la Katolika Eklezio povis pli-malpli observigi dum la longa periodo de feŭdismo, kiam la mono, ĉar ĝi pro malabundigo kaŭzis daŭran prezofalon, ludis relative nur malgravan rolon, kaj kiam pruntoj estis sole aŭ ĉefe porkonsumaj. Sed la Renesanco kaj la alfluo de oro kaj arĝento el Ameriko ebligis la disvolvigon de la kapitalismo. Pruntoj servis pli kaj pli por investado. Montriĝis tiam ke la malpermesoj de la interezo ne plu estis observigeblaj. Oni klopodis per starigo de interezolimo eviti la

procentegon, sed la leĝa limo tendencis esti super la merkata poŝo de interezo kaj sekvis ĉi tiun. La germana "*Lexikon für Theologie und Kirche*" (X 1068/71) (Leksikono por teologio kaj eklezio) konstatas ke la leĝaj malpermesoj de la interezo ne povis esti efiktenataj kaj ke la starigo de interezolimo ne povis efike malhelpi altgradan neleĝan eluzuradon de la popolo.

Kio estas nun la starpunkto de la Katolika Eklezio koncerne la interezon? Montriĝas ke laŭ la katolikaj moral-filozofoj la pruntokontrakto per si neniam leĝe rajtigas al postulado de interezo, sed ke povas ekzisti eksteraj titoloj kiuj rajtigas al la prenado de interezo. Ĉi tiuj eksteraj interezotitoloj estas jenaj:

- (a) la *persona malprofito* kiun la pruntedonanto suferas pro la pruntedono de sia havaĵo;
- (d) la *neakiro de senduba profito* kiun havus la pruntedonanto, se li ne pruntedonus sian havaĵon;
- (c) la *risko* ke la pruntedonanto ne ricevos sian havaĵon senmanka;
- (d) la eblo, ke la prunteprenanto ne plenumos tion, al kio li sin devigas; ĉi tio pravigas postulon de ia repago.

Kelkaj aldonas al ĉi tiuj 4 ĝenerale agnoskitaj interezotitoloj ankoraŭ kvinan:

- (e) la civilaj leĝoj kiuj rajtigas al prenado de interezo por monprunto.

En la nederlanda Katolika Enciklopedio ni legas jenon:

"Ĉe la mono prezentiĝas la speciala malfacilaĵo, ke kiel tia ĝi estas konsum-

eblaĵo, dum aliflanke, kiel interŝanĝilo ĝi akceptas la karakteron de la aĵo kontraŭ kiu oni interŝanĝas ĝin. Per si ĝi do ne kapablas doni interezon; nuntempe, tamen, la mono estas uzata ne plu preskaŭ nur por aĉeto de konsumeblaĵoj. Tial oni povas diri ke la mono — por tiel diri — alprenis la produktivan karakteron de poruzadaĵo, kio do pravigas la prenadon de interezo."

Ni nun zorge ekzamenu ĉion ĉi tion kaj esploru ĉu la nova starpunkto, ke la postulado de interezo estas pravigita kaj permesita, aŭ la malnova, ke ĝi estas uzuro kaj malpermesita, estas ĝusta.

(1) Kiam la mono konsistis el oro kaj arĝento, ĝi estis uzebla kaj uzata kiel ornamaĵo. Konsumeblaĵo ĝi estis nek tiam, nek poste. Konsumebla mono estis ekzemple kakaofaboj, kiuj iam servis al iuj indianaj triboj kiel mono. Efektive tia konsumebla mono per si ne povas elpostuli interezon. Ni povas diri tute ĝenerale, ke *mono* por ĉiu *estas varo*, t. e. valorajo kiun oni akiras, havas kaj ŝatas, ĉar oni povas kun iu alia interŝanĝi ĝin kontraŭ io alia.

(2) La katolikaj moralistoj opinias ke la postulado de interezo por la prunto de porkonsumaĵo (t. e. aĵo kies uzo konsistas esence en ĝia konsumo, — do: nutraĵoj, precipe) ĉiokaze estas nepre malpermesita. Tamen, oni ne povas nei, ke, se iu en tempo de ekstrema malabundo de nutraĵo pruntedonus panon, li donus ion nekompareble pli valoran, ol la pruntepreninto, kiam ĉi tiu redonus panon samkvalitan samkvante post finiĝo de la malabundo, kiam jam ree pano troviĝas en siteloj de forĵetaĵo. Por la pruntedonanto temas pri plistreĉado de la ĉirkaŭentra zono kaj la risiko mem fariĝi viktimo de la malsato; por la prunteprenanto la prunto eble

signifus saviĝon de la malsatmorto. La repago de tia senintereza prunto, tamen, signifus preskaŭ nenion por ambaŭ partioj. Laŭ mia opinio en tia kazo nepre temas pri la sub (a) menciita interezotitolo: la persona perdo aŭ malprofito kiun suferas la pruntedonanto.

(3) Plua demando estas: Ĉu ekzistas principa diferenco inter porkonsuma kaj porprodukta (aŭ porinvesta) pruntoj? *Ambaŭkaze* la konsumulo devas pagi la interezon, unuakaze, ĉar li persone estas la pruntepreninto, kaj duakaze, ĉar la pruntepreninto-entreprenisto, ĉu rekte, aŭ pere de ankoraŭ aliaj entreprenistoj, per la prezoj de la varoj kiujn li liveras, igas la konsumulojn pagi la interezon por la pruntita kaj en lian entreprenon investita kapitalo. *La interezon nepre ĉiam devas pagi la konsumulo*, kies urĝajn bezonojn, nescion kaj senpripenson daŭre ekspluatadas la interezuloj.

(4) Oni diras ke la prenado de interezo por monprunto pravigas la produktiva karaktero de la kapitalaĵoj en kiujn oni povas investi la monon. Tiel, tamen, oni starigas la aferojn plene kapon malsupre. Ĉu oni povas per tiaj kapitalaĵoj eltordi profiton el la konsumulo, ĉu la entreprenistoj-kapital-ekspluatistoj sukcesas ekipi siajn entreprenojn pagante al la laboruloj nur *parton* de la produkto de ilia laboro, tio dependas sole de la relativa abundo aŭ malabundo de ĉi tiu produktiva kapitalo. Ja ĉiu tiuj komprenas, ke, se morgaŭ la duono de la loĝantaro mortus pro epidemio, postmorgaŭ domkapitalo eĉ unu cendon da interezo ne donus, kaj eble eĉ nenian lupagon sukcesus elpostuli la domposedantoj. Tiel estis iuloke en Argentino en la krizaj naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Tiel estas ankaŭ nuntempe en Francujo en kelkaj lokoj tute forlasitaj

pro erodiĝo de la tero. Tia situacio tamen ne daŭrus. Iom post iom la loĝantaro ree kreskus kaj baldaŭ neŝataj domoj kaj aliaj neuzataj kapitalaĵoj rubiĝus pro manko de prizorgo, ĉar neniu investas monon, se avantaĝon de tio li ne havas. En tiaj cirkonstancoj la ŝparanto konservas sian monon — en la *mona* formo — kaj atendas ĝis post paso de tempo reestabliĝos tiu stato de malabundo kiu estas kondiĉo por la rentumeco de produktiva kapitalo.

La produktiva kapitalo do nur tial rentumas, ĉar ĝi estas malabunda. Kaj ĝi devas resti malabunda, ĉar alie mono ne estas investata en tian kapitalon, sed trezorigata de la ŝparantoj-havuloj. La mono ja estas preskaŭ senkoste tenebla kaj pro deflacio ĝi eĉ plivaloriĝas kaj krome oni havas la avantaĝon de ĝia *likideco* — t. e. de la fakto ke ĉiu ĝin akceptas kiel pagilon kaj ke tial ĝi prezentas por ekonomiaj transakcioj tuj pretan formon de havaĵo. Ĉi tiuj ecoj de nia tradicia mono igas ĝin la *prakapitalo*, de kiu ĉiuj ceteraj kapitalaĵoj derivas sian kapitalecon. Sen interezo mono ne estas disponigata por investadoj, kaj tial produktivaj kapitalaĵoj devas resti rentumaj, kaj do malabundaj. La aserto ke la mono kiel tia ne povas doni interezon aŭ rentumon, kaj derivas sian rentumecon aŭ kapitalecon de la “poruzadaĵoj” aŭ produktivaj kapitalaĵoj, plene inversigas la aferojn.

Ne estas seninterese parenteze rimarkigi, ke Marks kaj la marksanoj faris la saman pensaron kiel la katolikaj moralfilozofoj, kun nur ĉi tiu diferenco, ke la unuaj el tio konkludis, *ne*, kiel la lastaj, ke la interezo estas pravigita, sed ke oni povos ĉesigi la ekspluatadon de homo far de homo nur per la alsociigo de la produktilaro.

Ĉar ambaŭ konkludoj baziĝas sur la

sama erara premiso, ambaŭ estas egale malpravaj. Ne sen ironio ni rimarku ke en la “popoldemokratioj” oni ja alŝtatigis la produktilaron, sed ke — pro mono trezorigebla — la interezo senĝene parazitas plu, kaj ke niaj komunismaj fratoj eĉ ne rimarkas ke enestas malbono en tio!

Ni reprenu la fadenon de nia argumentado. Nia prefero por likido kaŭzas tion, ke la mezuro en kiu ni estas pretaj rezigni pri likido, dependas de la alteco de la kompenso kiun ni por tio ricevas, t. e. de la *likido-premio*. Ekspektoj pri malaltiĝo de la rentumeco de ĉiaspecaj investaĵoj implicas mal multe da demandumo por kapitalo, malleviĝantan poon de interezo, malleviĝantan likidopremion; kaj malalta kaj plimalaltiĝanta likidopremio implicas retenadon de pli kaj pli da mono. Kaj ankaŭ inverse: se la ŝparantoj pro la malmulta demandumo por kapitalo restas kun ŝparaĵoj en mona formo, tio implicas malaltan likidopremion kaj responde malaltan poon de interezo.

La rekta sekvo de la tenado de la mono estas nesufiĉa demandumo por produktaĵoj, kaj el tio rezultas ekonomia krizo.

Konkludo: Ni estas kondamnitaj restadi tiel malriĉaj, kiel estas necese por konservi la rentumecon de la kapitalo je tiu nivelo, kiun postulas nia mono.

(5) La lasta granda ekonomia malviglo — tiu de la tridekaj jaroj — ne nur alportis grandan mizeron por multaj milionoj da homoj, sed per tio ĝi ankaŭ kondukis Hitler al potenco. Hitler solvis la problemon klasikamaniere. Sian sloganon pri “*Brechung der Zinswirtschaft*” (Rompado de la interezo-ekonomio) li tuj forgesis. Por forkonduki la atenton for de la veraj kaŭzoj de la

Venu al Japanujo ĉi-someron!

La Loka Kongresa Komitato de la 50-a Japana Kongreso de Esperantistoj alvokas al eksterlandaj samideanoj, precipe al tiuj en la aziaj landoj, ke multaj el ili partoprenu tiun kongreson, kiu okazos de la 23-a ĝis la 25-a de aŭgusto de la nuna jaro, en Osaka. La partoprenontojn el ekster Japanujo gastigos L.K.K. *senpage* dum la kongresaj tagoj kaj eventuale organizos postkongresan turismon, kiun ili povos partopreni per netaj elspezoj kaj kun la helpo de tutlanda samideanaro. La enhavo de la kongreso estos plej varia kaj interesa, ĉar japanaj samideanoj nun estas pretaj eluzi ĉiun okazon de esp-ista renkontiĝo por prepari sin al la U.K. en Tokio.

La interesitaj samideanoj tuj petu la aliĝilon kaj informojn de: Loka Kongresa Komitato de la 50-a Japana Esp-Kongreso, ĉe Kansai-Ligo de Esp-Grupoj, 2-20, Nakatu Hamadoori, Ooyodo-ku, Osaka, Japanujo.

malfacilaĵoj, li kaj liaj kunuloj prezentis la judojn kaj la eksterlandon kiel la malbonulojn. Tio lin provizis per preteksto por la rearmano de Germanujo; tiu rearmano reestablis la rentumecon de investaĵoj kaj ĉesigis la senlaborecon kaj kondukis al la dua mondmilito.

Depost 1945 la Okcidento nur per daŭra vetarmado, per militoj malvarma kaj varma — ni memorigu pri Koreujo — sukcesis eviti novan gravan ekonomian malviglon, kaj, kiel montris la eta malviglo de antaŭ kelkaj jaroj, nur kun peno.

La komunismo sendube estas granda danĝero, sed ĝi ankaŭ estas ido de la kapitalismo kaj certe ĝi ne estas ekstermebla per militaj rimedoj. Plenaj de fido la komunistoj atendas la proksiman krizon de la kapitalismo, kiu alportos al la komunismo novan predon. Tamen, la fakto ke la fluo de rifuĝantoj el Orienta al Okcidenta Germanujo ĉiam ankoraŭ daŭras, montras ke la komunismo ne estas akceptebla alternativo por la kapitalismo. Ĉe tio ni ne forgesu ke interezo, ekspluatado, proletaro, ekonomiaj malvigloj, militoj, kaj komunismo estas konsekvencoj de tia mono, en kiu oni klopodis kunigi du esence ne kombineblajn funkciojn: tiun de inter-

ŝanĝilo, — kiu postulas cirkuladon —, kaj tiun de trezoraĵo, — kiu postulas ke oni povu trezorigi monon pli avantaĝe ol kiun ajn alian valoraĵon.

(6) La demando nun do estas: Ĉu nepre tiel devas esti? La mono estas kreaĵo de la homo. *Li* donis al ĝi la ecojn kiujn ĝi nun havas. Li *ankaŭ* havas la *eblon* doni al ĝi aliajn ecojn, alian karakteron, tiel ke ĝi perdu sian potencon kaj estu reduktata al tia servema servisto, kia ĝi devas esti.

Imagu ke *mono* (sed *ne* alispeca havaĵo) estas impostata per ekzemple 10% jare — aŭ ke la mona aŭtoritato per plimultigo de la mono establas kaj daŭrigadas inflacion, t. e. leviĝon de la ĝenerala prezonivelo, de 10% jare —, do la mono rapide cirkuladas, ankaŭ kiam la reala interezo jam tute malaperis. Oni estos preta pruntedoni sian monon ne ricevonte efektivan aŭ realan interezon, ĉar trezorigado de mono kaŭzas realan perdon de 10% jare. Reala poo de interezo egala al nulo signifas likido-premion de 10% jare. Tio garantias rapidan cirkuladon de la mono.

Tian imposton je mono oni havis en granda parto de Centra Eŭropo en la Mezepoko, proksimume inter 1150 kaj 1350. La celo de tiu imposto tiam estis:

provizi la princojn per mono. Tamen, flanka efiko estis: prospero, florado de la kulturo (Gotiko) kaj de la komerco (Hanzo). Ke ĉion ĉi tion oni devis danki al ĉi tiu imposto je mono — sub formo de oftaj, ekz. ĉiujaraj, monrenovigoj kun ĉiufaj depago de 20 aŭ 25% —, oni tiam tute ne komprenis, evidente, ĉar en la 14a jarcento oni postulis kaj akiris la forigon de ĉi tiuj monrenovigoj kaj la reenkondukon de la “eterna monero”. Nur antaŭ kelkaj jardekoj iu adepto de Silvio Gesell — mi eĉ ne scias kiu — kiu, armita per la instruo de Gesell, trafis sur ĉi tiujn, cetere de la fakuloj ĝenerale konatajn, sed en siaj kaŭzaj rilatoj ne komprenitajn faktojn, trovis en ili la konfirmon de la Gesell-a teorio.

(7) Ni do vidas, ke efektive nia mondo povos aspekti alie — pli justa, pli prospera, pli libera, pli paca — ol ĝi aspektas nun. Ni vidas ke de mono oni povas forpreni la potencon, ke ni povas detrui kaj forigi la barojn, la obstaklon, kiu jam de kelkmil jaroj malhelpas la interezon malaperi kaj la homon per laborado venki la malabundon.

Se uzuro estas la ekspluatado de la bezonoj, la nescio kaj la senpripensado de la proksimulo, do ĉi tie temas pri la kvadrato de l' uzuro. Ja ne nur oni ekspluatadas la bezonegajn, la nescion kaj la senpripensadon de la grandega plimulto de la homoj, sed ĉi tiujn bezonegajn kaj nescion oni artefare kaj intence daŭrigadas, kvazaŭ eternigas. Militon kaj komunismon oni ĉe tio akceptas kiel bedaŭrindajn neeviteblajn.

La popolo restados dividita en ekspluatantojn kaj ekspluatatojn — eĉ se multaj el ĉi tiuj havas televidan aparaton grandparte pagendan ankoraŭ partopoe — tiel longe, kiel havaĵo havigas enspezojn, kiel la mono malebligas

la malaperon de la uzuro. La popolo restados relative malriĉa kaj malprospera tiel longe kiel nia tradicia mono kreas la malabundon kaj la proletaron, kiuj estas ĝiaj nepraj akompanaĵoj.

La ekspluatatoj prezentas la grandegan plimulton de la popolo. En formala demokratio ili havas la potencon ĉesigi la ekspluatadon per monreformo, sed ili estas sensciaj kaj senpripensaj, kaj la profituloj de la sistemo sukcesas teni ilin tiaj. Ĉu en niaj lernejoj ni lernas pri ĉi tiuj aferoj? Ĉu nin informas kaj instruas la organoj kiuj formas la publikan opinion? Ĉu ili klarigas al la ekspluatataj civitanoj kiel kaj kial ili estas ekspluatataj kaj eventuale pelataj en militon? Neniel! La popolon — almenaŭ ĉi-koncerne — oni tenas stulta. Tio estas la nepra kondiĉo por povi plu ludi la filudon de la uzuro. Tiel la ŝtato — malgraŭ formala demokratio kaj malgraŭ organizaĵoj de la ekspluatatoj, politikaj kaj sindikataj — plu estas la ekspluat-instrumento de la uzurprenanta klaso.

(8) Ni nun, fine, revenu al la interezotitoloj kaj konstataj ke (c), la *riskopremio*, kaj (d), la eventuala *punpago* okaze de neplenumo de interkonsentitaj kondiĉoj, kun interezo, proprasence, havas nenion komunan.

Se ni lasas ekster konsidero la avantaĝon de likido — nepra karakterizaĵo de ĉia mono en ĉiuj cirkonstancoj —, pri (a), *persona perdo* suferata pro senintereza monprunto, ne povas temi, krom en kazo de inflacio. Se okazas inflacio de 10% jare, laŭnoma aŭ mona poo de interezo de 10% jare respondas al reala interezo egala al nulo, kaj tial estas nepre permesita. Ja gravas ne la nomo, sed la efektivo.

Ankaŭ pri (b), la *rezigno pri nepra profito*, ne povas temi. Se oni investas ŝparaĵon en produktivan kapitalon, oni

havas profitoŝancon. Tamen, se tiaj investoj fariĝas abundaj, tio mallevas la rentumecon, kaj fine ĉia profitoŝanco malaperas. Prefere oni evitas ke tia situacio estiĝu, kaj konservas sian monon konsiderante ke eble tio montrigos avantaĝon, kiam en iu momento prezentiĝos oportuna kaj favorŝanca okazo por ekonomia transakciado. Ankoraŭfoje mi ripetu: ne tiel estas, ke la mono derivas sian kapitalecon, sian rentumecon, de la produktiva kapitalo, de la aĵaro per kiu oni produktas varojn kaj servojn, sed inverse: la produktiva kapitalo restadas rentuma pro la karaktero de la mono, la prauzurilo.

Koncerne la de nur kelkaj akceptitan interezotitolon (e), la *sintenon de la ŝtato* koncerne la interezon, ni konstataj ke al la eklezio ne estas inde rigardi uzuron morale akceptebla, se la ŝtato — la instrumento de la uzuristoj — bonvolas permesi ĝin.

Konkludo: El la mono — kies tasko estas faciligi la interŝanĝadon — ni faris uzurilon, interŝanĝilon kiu senpune strikas kiam ĝi ne ricevas sian interezon!

Mi vin demandas: Kio pravigas ĉi tiun uzuron? Ĉu vi rajtas foriri el ĉi tiu kunveno kaj forgesi pri la afero? Ĉu vi estas preta kunbatali kontraŭ ĉi tiu uzuro, kaj tiel kunbatali por pli da justeco, pli da libero, pli da paco, kaj pli da prospero? En demokratio vi persone kunrespondecas. Ankaŭ *via* helpo estas

bezonata!

Laŭ la angla historiisto Toynbee la historio instruas ke kulturoj pereis ĉiam pro tio, ke al iu grava defio oni ne trovis taŭgan respondon. La defio preskaŭ ĉiam estis la sama: la sociala problemo. Eble ke por la tiutempuloj ekzistas la senkulpigo ke solvon ili ne sciis kaj ne sukcesis trovi. Por *ni* tiu senkulpigo *ne* ekzistas, kaj ne nur nia *kulturo*, sed ja la homaro mem, kaj eĉ la vivo entute, estas minacata per perejo. Minacas nin ni mem, nia stulto, nia senpripensado, nia ŝafeco, nia kapitulacemo, nia “post ni la diluvo”-sinteno.

La perejo ne estas nepra. Ankoraŭ ne estas tro malfrue por ĝin eviti. Ni faru nian eblon. Ni akceptu la defion. Ni batalu. Kaj se tamen ni pereos, se tro malfortaj estos ni, almenaŭ ni ne havu kaŭzon al ni mem riproĉi ke ni ja faris nenion por eviti tiun sorton. Geamikoj, mi kalkulas je via helpo!

P. S. Silvio Gesell, la “inventisto de la impostata mono”, naskiĝis antaŭ 100 jaroj. Mallonga biografia artikolo aperis en Sennaciulo, aprilo 1962.

Adreso de la aŭtoro: D-ro W. P. Roelofs, Kerkpad ZZ 75, Soest, Nederlando.

Adreso de la Libersocia Rondo: sekretario S-ro B. Hasecke, Königstr. 26, Velbert (Rheinl.), Germanujo.

(Prelego farita en la libersociana kunsideo en la UK de Esperanto en Bruselo en 1960)

Listo de la komunumoj mondanigitaj (*daurigo*)

La ciferoj inter krampoj montras la vicordon de ilia mondanigo:

Urboj: (237) Koojo-maĉi, urbeto en Hiroŝima-ken, 17 julio, 1962. (238) Ĉigasaki-ŝi, urbo en Kanagaŭa-ken, 6 dec. (239) Uĉida-maĉi, urbeto en Ŭakajama-ken, 25 dec. (240) Sendai-ŝi, urbo en Kagoŝima-ken, 7 feb., 1963. (241) Akaŝi-ŝi, urbo en Hjogo-ken, 7 marto. (242) Honjo-ŝi, urbo en Saitama-ken, 11 marto.

Prefektujoj: (16) Metropolo Tokio, 26 feb. (17) Hjogo-ken, 15 marto.

La Libro de Teo

II. La Skoloj de Teo

Teo estas arta verko kaj bezonas majstran manon por eligi ĝian plej noblan kvaliton. Ni havas teojn bonan kaj malbonan, kiel ni havas pentraĵojn bonan kaj malbonan — ĝenerale la lastan. Ne troviĝas unuopa preskribo por fari la perfektan teon, kiel ne troviĝas reguloj por produkti iun Titian¹²⁾ aŭ Sesson¹³⁾. Ĉiu pretigo per la folioj havas sian individuecon, sian korigecon kun akvo kaj varmo, siajn heredajn memorojn por revoki, sian propran manieron por fari rakonton. Kio estas vere bela ĉiam devas troviĝi en ĝi. Sed kiom multe ni suferas pro la konstanta nepovo de la socio rekoni ĉi tiun simplan kaj fundamentan leĝon de la arto kaj la vivo; Liĉiĉin, Sung-poeto, malgaje rimarkis, ke troviĝas tri plej plorindaj aferoj en la mondo: la aĉigo de bonaj junuloj per falsa edukado, la malnobligo de bonaj pentraĵoj per vulgara admiro, kaj la tuta fuŝado de bona teo per nekompetenta manipulado.

Kiel Arto, Teo havas siajn periodojn kaj siajn skolojn. Ĝia evoluo povas esti dividita maldetale en tri ĉefajn stadiojn: la Bolteo, la Kirloteo kaj la Infuzteo. Ni modernuloj apartenas al la lasta skolo. Tiuj apartaj manieroj, per kiuj oni aprecas la trinkaĵon, indikas la spiriton de la epokoj, en kiuj ili prosperis. Ĉar nia vivo estas esprimo, niaj senkonsciaj agoj konstante perfidas nian plej internan penson. Konfucio diris, “kiel homo povus sin kaŝi!” Ni tro multe malkaŝas nin mem en malgrandaj aferoj, probable tial ke ni havas tro malmulte da grandaj por kaŝi. La etaj incidentoj de ĉiutaga rutino estas ne malpli granda komentario de rasaj idealoj ol la plej alta flugo de filozofio aŭ poezio. Kiel la diferenco de ŝatataj vinrikoltoj markas la apartajn idiosinkraziojn de la malsamaj periodoj kaj naciecoj de Eŭropo, tiel la Te-idealaj karakterizas la variajn humorojn de Orienta kulturo. La Brikteo, kiu estis boligata, la Pulvorteo, kiu estis kirlata, la Foliteo, kiu estis infuzata, markas la apartajn emociajn impulsojn de la Tang-, Sung- kaj Ming-dinastioj de Ĉinujo¹⁴⁾. Se al ni plaĉas prunti la multe misuzitan terminologion de art-klasifikado, ni povus titoli ilin respektive, la Klasika, la Romantika kaj la Naturalisma Skoloj de Teo.

La teplanto, devenaĵo de suda Ĉinujo, estis konata ekde tre fruaj

tempoj en Ĉina botaniko kaj medicino. Ĝin oni mencias en la klasikaĵoj sub la diversaj nomoj de Tou, Ŝê, Ĉuan, Ĉia kaj Ming, kaj alte taksis, ke ĝi havas la virtojn por senlacigo, animplezurigo, volfortigo kaj vidpova rebonigo. Ĝin oni ne nur donis kiel dozon por interna uzo, sed ofte aplikis ekstere en la formo de pasto por malakrigi reŭmatisman doloron. La Taoistoj pretendis, ke ĝi estas grava ingredienco en la eliksiro de la senmorteco. La Budhistoj vaste uzis ĝin por malhelpi la dormemon dum iliaj longaj horoj de meditado.

En la kvara kaj kvina jarcentoj Teo fariĝis ŝatata trinkaĵo de la loĝantoj en la baseno de Rivero Jangcio¹⁵⁾. Estis en tiu tempo, ke la moderna ideografiaĵo Ĉa estis elkovita, evidenta simpligo de la klasika Tou. La poetoj de la sudaj dinastioj lasis post si kelkajn fragmentojn de sia fervora adorado pri la “ŝaŭmo de la likva jado”. Tiutempe, la imperiestroj donacis la raran preparaĵon el la folioj al siaj altaj ministroj kiel la rekompenco por eminentaj servoj. Tamen la maniero de tetrinkado en tiu stadio estis ekstreme primitiva. La foliojn oni vaporumis, dispremis en muelilo, faris en brikon kaj boligis ĝin kun rizo, zingibro, salo, oranĝ-ŝelo, spicoj, lakto kaj kelkfoje cepo. La kutimo restas nuntempe inter la Tibetanoj kaj diversaj Mongolaj triboj, kiuj faras ian siropon el tiuj ingrediencoj. La uzado de citronaj tranĉpecoj de la Rusoj, kiuj lernis trinki teon el la Ĉinaj karavangastejoj, indikas la postvivon de la antikva metodo.

Oni bezonis la genion de la Tang-dinastio por emancipi Teon el ties kruda stato kaj konduki al la fina idealigo. En la persono de Luŭu (?—785), kiu aperis en la mezo de la oka jarcento, ni havas nian unuan apostolon de teo. Li estis naskita en epoko, kiam la Budhismo, Taoismo kaj Konfucianismo estis serĉantaj sian komunan sintezon. La panteisma simbolismo de tiu tempo urĝis, ke oni spegulu la Univerŝon en io Aparta. Luŭu, poeto, vidis en la Teservo la saman harmonion kaj ordon, kiu regas en ĉiuj aferoj. En sia fama verko, la “Ĉaking” (La Sutro de Teo) li formulis la Kodon de Teo. De tiam li estas adorata kiel la protektanta dio de la Ĉinaj te-komercistoj.

La “Ĉaking” konsistas el tri volumoj kaj dek ĉapitroj. En la unua ĉapitro Luŭu pritraktas la naturon de la teplanto, en la dua la ilojn por kolekti la foliojn, en la tria la selektadon de la folioj. Laŭ li, la plej bona kvalito de la folioj devas havi “faldetojn kiel la ledboto de Tartaraj ĉevalrajdistoj, krispon kiel la kolpendaĵo de forta bovo, disvolvon kiel la nebulo leviĝanta el ravino, brilon kiel la flako karesata de zefiro, kaj esti malseka kaj mola kiel la freŝa tero lavita de pluvo”.

La kvaran ĉapitron li dediĉas por elnomigo kaj priskribo de la dudek

kvar eroj de la te-ekipaĵo, komencante de la tripieda forno kaj finante per la bambuŝranko por enteni ĉiujn tiujn instrumentojn. Tie ĉi ni rimarkas la korinklinon de Luŭu al la Taoista simbolismo. Estas interese ankaŭ observi en tiu ĉi rilato la influon de teo sur Ĉina ceramiko. la Ĉina porcelano, kiel bone konate, originis el la klopodo reprodukti la elegantan nuancon de jado, kio rezultigis, dum la Tang-dinastio, en la blua glazuro de la sudo, kaj en la blanka glazuro de la nordo. Luŭu konsideris la bluan kiel la idealan koloron por la tetaso, ĉar ĝi provizis plian verdecon al la trinkaĵo, dum la blanko igis ĝin rozeca kaj malplaĉa. Tio estis ĉar li uzis la brikteon. Poste, kiam la te-majstroj de Sung ekkutimiĝis al la pulvorteo, ili preferis la pezajn bovlojn de blunigra aŭ nigrebruna koloro. La Minganoj, kun sia infuzteo, trovis plezuron en malpeza, blanka porcelanaĵo.

En la kvina ĉapitro Luŭu priskribas la metodon de tepretigo. Li eliminis ĉiujn ingrediencojn, escepte salon. Li detalumas ankaŭ pri la multe-diskutita demando rilate la elekton de akvo kaj la gradon de ties boligo. Laŭ li, la montara fontakvo estas la plej bona, la riverakvo kaj la putakvo sekvas en la ordo de mencio. Troviĝas tri fazoj de boligado: la unua bolo estas kiam la vezikoj kiel la okuloj de fiŝoj naĝas sur la surfaco; la dua bolo estas kiam la vezikoj fariĝas kiel kristalaj bidoj ruliĝantaj en fontano; la tria bolo estas kiam la ondoj kirligas uragane en la bolpoto. La Brikteon oni rostas antaŭ la fajro ĝis ĝi fariĝas mola kiel 'la brako de bebo', kaj dispecigas ĝin en pulvoron inter la folioj de bonkvalita papero. Salon oni enmetas ĉe la unua bolo, la teon ĉe la dua. Ĉe la tria bolo oni verŝas ĉerpilon da malvarma akvo en la kaldronon por ripozigi la teon kaj revivigi "la junecon de la akvo". Poste la trinkaĵon oni verŝas en tasojn kaj trinkas. Ho nektaro! La filmecej folioj ŝvebas kiel skvamaj nuboj en serena ĉielo aŭ flosas kiel akvolilioj sur smeralda fluo. Estis pri tia trinkaĵo, ke Lutung, Tang-poeto, iam skribis: "La unua taso malsekigas miajn lipojn kaj gorĝon, la dua taso rompas mian solecon, la tria taso serĉas mian malfekundan internaĵon¹⁶⁾ nur por trovi tie kvin-mil volumojn da ideografiaĵoj. La kvara taso kaŭzas etan ŝviton, — ĉiuj malkontentoj de la vivo forvaporas el miaj poroj. Ĉe la kvina taso mi estas purigita; la sesa taso vokas min al la regno de la senmortuloj. La sepa taso — ha, mi plu ne povas preni! Mi nur sentas la mildan blon de vento, kiu leviĝas el sub miaj manikoj. Kie estas Horaisan?¹⁷⁾ Lasu min rajdi sur ĉi tiu agrabla venteto kaj foriri tien".

La ceteraj ĉapitroj de la "Ĉaking" temas pri la vulgareco de la ordinaraj manieroj de tetrinkado, la historia resumo de eminentaj te-trinkemuloj, la famaj te-plantejoj de Ĉinujo, la variaĵoj de teservico kaj ilustraĵoj de

la teiloj. La fina ĉapitro bedaŭrinde estas perdita.

La publikigo de la "Ĉaking" devas esti kreinta konsiderindan sensacion en tiu tempo. Luŭu estis amike helpata de la Imperiestro Taisung (763-779), kaj lia famo altiris multajn sekvantojn. Oni diras ke kelkaj delikatoj povis distingi la teon pretigitan de Luŭu disde tiu de liaj disĉiploj. Unu mandareno eĉ senmortigis sian nomon tial ke li malsukcesis apreci la teon de tiu ĉi granda majstro.

En la Sung-dinastio la kirloteo ekmodiĝis kaj kreis la duan skolon de Teo. La foliojn oni dismuelis en subtilan pulvoron en ŝtona muelileto, kaj la preparaĵon oni kirlis en varma akvo per delikata kirlilo farita el displitita bambuo. La nova procedo enkondukis ioman ŝanĝon en la te-ekipaĵon de Luŭu, same kiel en la elekton de la folioj. Salon oni ellasis poreterne. La entuziasmo de la Sung-popolo por teo ne konis la limojn. Epikuranoj konkuris unu la aliajn por malkovri novajn variojn, kaj okazigis regulajn konkursojn por decidi ilian superecon. La Imperiestro Kiasung (1101-1124), kiu estis tro granda artisto por esti bonkondata monarko, malŝparis siajn trezorojn por akiri rarajn speciojn. Li mem verkis disertaĵon pri la dudek specoj de teo, el kiuj la "blankan teon" li taksis la plej rara kaj bona kvalito.

La te-idealaj de la Sunganoj diferencis de tiuj de la Tanganoj, same kiel diferencis iliaj nocioj pri la vivo. La Sunganoj klopodis aktualigi kion iliaj antaŭuloj provis simboligi. Por la Nov-konfuciana koro la kosma leĝo ne estis reflektita en la fenomenaj mondo, sed la fenomenaj mondo mem estis la kosma leĝo. Eonoj estis nur momentoj — Nirvano ĉiam estis atingebla. La Taoisma koncepto, ke la senmorteco kuŝas en la eterna ŝanĝiĝo, trapenetris ĉiujn modojn de ilia penso. Estis la procedo, ne la faro, kio interesis ilin. Estis la kompletigado, ne la kompleteco, kio estis vere vivgrava. Homoj venis rekte fronti la naturon. Nova signifo eniris en la arton de vivo. La teo jam ĉesis esti poezia tempopasigilo, sed fariĝis unu el la metodoj de mem-realgado. Ŝang Ju-Ĉeng laŭdegis teon, ke ĝi "trafluas lian animon kiel rekta parolo, ke ĝia delikata amareco rememorigas al li la postguston de bona admono". Sutungpo priskribis la forton de la senmakula pureco en teo, ke ĝi defias korupton same kiel la vera virtulo. Inter la Budhanoj, la suda Zen-sekto, kiu enkorpiĝis en si tiom multe da Taoismaj doktrinoj, formulis la detalan riton de teo. La monakoj kolektiĝis antaŭ la statuo de Bodi-Darmo¹⁸⁾ kaj trinkis teon el unuopa bovlo kun la profunda formaleco de sankta sakramento. Estis tiu ĉi Zenrito, kiu fine evoluis en la Te-ceremonion de Japanujo en la dek-kvina jarcento.

Malfeliĉe la subita eksplodo de la Mongolaj triboj en la dek-tria

jarcento — kiu rezultigis la ruinon kaj malvenkon de Ĉinujo sub la barbara regado de la Juan-imperiestroj — detruis ĉiujn fruktojn de la Sung-kulturo. La indiĝena Ming-dinastio, kiu provis la restarigon de sia nacio en la mezo de la dek-kvina jarcento, estis turmentata de internaj malfacilaĵoj, kaj Ĉinujo falis sub la fremdan regadon de la Manĉuroj en la dek-sepa jarcento. La moroj kaj kutimoj ŝanĝiĝis por lasi nenian postsignon de la antaŭaj tempoj. La pulvorteo estis entute forgesita. Ni trovas unu komentariiston de Ming embarasita eĉ por revoki al si la formon de la tekirlilo menciita en unu el [la Sung-klasikaĵoj. Nuntempe, kiam oni trinkas teon, oni enmetas la foliojn en varman akvon en bovlo aŭ taso. La kaŭzo kial la Okcidenta mondo estas nescia pri la pli malnova maniero de tetrinkado estas klarigebla per la fakto, ke Eŭropo eksciis ĝin nur fine de la Ming-dinastio.

Al la pli posta Ĉino teo estas delikata trinkaĵo, sed ne ideala. La longaj malfeliĉoj de lia lando rabis al li la ĝuemon por la signifo de la vivo. Li iĝis moderna; tio estas, li maljuniĝis kaj elreviĝis. Li perdis tiun subliman fidon en iluzioj, kiuj konsistigis la eternan junecon kaj vigelecon de la poetoj kaj antikvuloj. Li estas eklektika kaj ĝentile akceptas la tradiciojn de la universo. Li ludas kun la Naturo, sed ne riskas konkeri, nek flatas adori ĝin. Lia Foliteo ofte estas mirinda kun sia flora aromo, sed en lia taso oni jam ne povas trovi la romantikecon de la Tang-kaj Sung-ceremonioj.

Japanujo, kiu fidele sekvis la piedsignojn de Ĉina civilizo, konis la teon en ĉiuj ties tri stadioj. Jam tiel frue kiel en la jaro 729 — ni legas — Tennoo Ŝoimu donis teon al cent monakoj ĉe sia palaco en Nara. La folioj probable estis importataj de niaj ambasadoroj ĉe la Tang-kortego kaj pretigataj laŭ la maniero, kiu tiam estis en modo. En 801 la monako Saiĉoo¹⁹⁾ hejmen portis kelkajn semojn kaj plantis ilin en Monto Hiei. En la sekvintaj jarcentoj ni aŭdas ne nur pri multaj tegardenoj, sed ankaŭ pri la aristokrataro kaj pastraro, kiuj ĝuegis la trinkaĵon. La Sung-teo atingis nin en 1191, kiam revenis Eisai-zenĵi²⁰⁾, kiu iris tien por studi la sudan Zen-skolon. La novaj semoj, kiujn li hejmen portis, estis sukcese plantitaj en tri lokoj, unu el kiuj, la Uji-distrikto apud Kioto, ankoraŭ portas la nomon de la loko produktanta la plej bonan teon en la mondo. La suda Zen disvastiĝis kun mirinda rapideco, kaj kun ĝi la te-rito kaj la te-idealo de la Sung. Je la dek-kvina jarcento, sub la patronado de la Ŝoguno Aŝikaga-Ĵoŝimasa, la te-ceremonio estis plene ellaborita kaj fariĝis sendependa kaj sekulara prezentado. De tiam la Teoismo estas plene establita en Japanujo. La uzado de la infuzteo en la posta Ĉinujo estas relative nova al ni, ĉar ni ekkonis ĝin nur post la mezo de la dek-sepa jarcento.

Ĝi prenis la lokon de la pulvorteo en la ordinara konsumo, kvankam la lasta ankoraŭ daŭre tenas la lokon kiel la teo de teoj.

Estas en la Japana te-ceremonio, ke ni vidas la kulminon de la te-idealoj. Nia sukcesa rezisto al la Mongola invado en 1281 ebligis al ni, ke ni daŭrigu la Sung-movadon, interrompitan tiel detruite mem en Ĉinujo pro la nomada enveno. Teo al ni fariĝis io pli ol idealigo de la formo de tetrinkado; ĝi estas religio en la arto de vivo. La trinkaĵo fariĝis preteksto por la adorado de pureco kaj rafiniteco — sankta funkcio per kiu la gastiganto kaj la gastoj kunagas por produkti en tiu okazo la plej grandan beatecon de la mondo. La teĉambro estis oazo en la terura dezerto de ekzistado, kie la lacaj vojaĝantoj povis kunveni kaj trinki el la komuna fonto de artaprecado. La ceremonio estis improviza dramo, kies intrigon oni teksis ĉirkaŭ la teo, la floroj kaj la pentraĵoj. Neniu koloro por ĝeni la tonon de la ĉambro, neniu sono por difekti la ritmon de aferoj, neniu gesto por sin trudi al la harmonio, neniu vorto por rompi la unuecon de la ĉirkaŭaĵo; ĉiuj movoj por esti plenumataj simple kaj nature — tiaj estis la celoj de la te-ceremonio. Kaj sufiĉe strange, tio estis ofte sukcesa. Subtila filozofio kuŝis post ĝi tuta. La Teoismo estis la Taoismo — aliformita.

(*Dairigota*)

12) Titian (1477-1576), itala pentristo.

13) Sesson (1347-1403), japana pentristo.

14) La dinastioj de Ĉinujo: Tang (618-907); norda Sung (960-1126) kaj suda Sung (1127-1279); kaj Ming (1368-1644).

15) Rivero Jangcio: la ĉefa rivero de Ĉinujo, kiu apud Ŝanhajo elfluas en la Orient-Ĉinan Maron.

16) "mian malfekundan internaĵon" aludas la mankon de verkista talento.

17) "Horaisan" (Monto Horai) estas la japana prononco de *Peng Lai Ŝan*. La ĉina elizeo. — Noto de l' aŭtoro.

18) Bodi-Darmo, hindo (? — 528), la fondinto de la ĉina Zenismo.

19) Saiĉoo, alnomata Dengjoo-daiŝi, japano (767-822), la fondinto de la japana Tendai-Budhismo ĉe Monto Hiei, Kioto.

20) Eisai-zenĵi, japano (1141-1215), la fondinto de [la japana Rinzi-sekto de Zenismo.

Trad. T. Mikami

"OOMOTO" — kia MOTO ?

OO reprezentas Orienton kaj Okcidenton :
nia gazeto celas ilian harmonian kuniĝon surbaze
de la reciproka kompreno, respekto kaj amo.

Delegitoj al Tutmonda Konferenco pri Elektra Povo vizitas

La Naturvaporan Projekton de Nov-Zelando

Unu el la elstaraj interesajoj por la delegitoj de la 6a Mondkonferenco pri elektra povo, kiuj flugis 2000 kilometrojn trans la maron de Tasman, de Melburno al Nov-Zelando, estis la naturvaporan projekto ĉe Wairakei. Estis reprezentantoj de dek kvar landoj, inter ili Usono, Rusujo, Germanujo, Japanujo, Kanado, Francujo, Svedujo, Aŭstrio, Niĝerio kaj Pakistano.

Wairakei, la unua ĝenerejo en la Brita naciaro uzanta elteran vaporon, estas la dua tia grandskala ĝenerejo en la mondo. La unua estas ĉe Lardarello en Italujo. Inter la landoj, kiuj helpis per kontraktita provizo de maŝinoj, estis Germanujo, Svisujo, Italujo, Britujo kaj Usono.

En la jaro fininta la 31an de Marto 1962 Wairakei produktis proksimume 491,000,000 kilovathorojn, iom malpli ol dekonon de la tuta neceso de la Norda



Insulo. Oni kredas, ke kiam la nuna projekto finkonstruiĝos, la tuta produktado estos pli ol 1,000,000,000 kilovathoroj jare.

Lokita en la mezo de geĵera regiono, 240 kilometrojn longa kaj 30 kilometrojn larĝa, Wairakei estas apud la ĉefvojo inter Auckland, plej granda civito de Nov-Zelando, kaj la ĉefurbo, Wellington.

En Nov-Zelando 80 procentoj de la ĝenerada kapablo de 1.56 milionoj da kilovatoj en 1961 estis funkciigitaj per akvo.

La kapablo de ŝtatposedataj ĝenerejoj en la Norda Insulo estis en Marto, 1962, 1,217,245 kilovatoj, enkalkulante 180,000 kilovatojn de karbobruliga ĝenerejo ĉe Meremere kaj 91,245 kilovatojn de Wairakei.

La plejmulto de la hidroelektra povo produktita en la Norda Insulo venas el du grupoj de ĝenerejoj — sep apud la rivero Waikato kaj tri kiuj utiligas akvon el la lago Waikaremoana. Unu plua ĝenerejo konstruiĝas apud la rivero Waikato.


La Waikato-rivero estas la plej longa en Nov-Zelando (350 kilometrojn). Ĝi drenas la lagon Taupo, kiu troviĝas je alto de 358 metroj kaj havas areon de 616 kvadrataj kilometroj, profundon de 285 metroj, kaj ricevas akvon el 3,240 kvadrataj kilometroj. Ĉi tiu lago estas fama pro tio, ke tie estas ebleco

kapti trutojn, tiel belajn kiel ie ajn en la mondo. Sin sekvante laŭ 190 kilometroj de la rivero estas la jenaj ĝenerejoj, kun iliaj kapabloj: Karapiro (90,000 kilovatoj), Arapuni (157,800 k. v.), Waipapa (51,000 k. v.), Maraetai (180,000 k. v.), Whakamaru (100,000 k. v.), Atiamuri (84,000 k. v.), Ohakuri (112,000 k. v.), kaj oni planas fini en 1964 Aratitania-on (90,000 k. v.). Ĉi tiuj ĝenerejoj utiligas 82 procentojn de la tuta fluo de akvo.

Lago Waikaremoana, 54 kvadratajn kilometrojn laŭ areo estas iom oriente de la mezo de la Norda Insulo, kaj ĝia akvo funkciigas tri ĝenerejojn: Tuai (52,000 kilovatoj), Piripaua (40,000 k. v.) kaj Kaitawa (32,000 k. v.).

Meremere, 64 kilometrojn sude de Auckland, uzas ĉiujare 600 ĝis 800 milionajn kilogramojn da karbo; du trionoj de karbo estas alportita per du paralelaj ŝnurvojoj el malkovritaj minejoj 10 kilometrojn for.

En la Suda Insulo oni evoluigas la basenon de la rivero Waitaki, celante fine produkti 1,500,000 kilovatojn. La rivero drenas tri lagojn — Tekapo, Pukaki kaj Ohaukies: kunigita areo estas 225 kvadrataj kilometroj. Siavice la lagoj pleniĝas de pluvo kaj neĝo, kiu falas en la Sudaj Alpoj, alta montaro, kiu etendiĝas preskaŭ la tutan longon de la Suda Insulo. Du ĝenerejoj nun funkcias: Waitaki (105,000 kilovatoj) kaj Tekapo (25,200 k. v.). Alia ĝenerejo konstruiĝas ĉe Benmore (540,000 k. v.). Ĉi tiu estas la plej granda ĝenerejo, kiun oni ĝis nun konstruis en Nov-Zelando. Nekutima



trajto estas la tera digo, kiu enhavas 12,000,000 kubajn metrojn da materialo, kun alto de 110 metroj, entuta longo ĉe la supro (enkalkulanta en- kaj elfluejojn) de 1067 metroj kaj ĉebaza larĝo de 460 metroj.

Jus anonciĝis oficiala aprobo por la konstruo de Avimore (220,000 k. v.) plurajn mejlojn preter Benmore laŭ la rivero.

La plej granda ĝenerejo en Nov-Zelando estas Roxburgh (320,000 k. v.) apud la rivero Clutha, kiu drenas tri lagojn, Hawea, Wakatipu kaj Wanaka.

Ĉiu insulo havas sendependan reton de transportaj linioj, sed ekkomenciĝas projekto kunigi ĉi tiujn du sistemojn per supertera dratego portanta rektan kurenton je kvincent mil voltoj, kaj per submara kablo trans la Cook-a markolo. Estas 570 kilometroj da supertera konduklinio necesiganta 1,650 turojn. Oni enmarigos tri kablojn — unu kiel anstataŭanton se necesos — dum Marto kaj Aprilo, 1964. Ili estos el tipo antaŭsaturita, kun papera izoligaĵo, plenigitaj per gaso je alta premo, kun diametro de 13 centimetroj. Ili pezos po 45 kilogramoj



en ĉiu metro. Oni jam komencis fabriki ilin en Britujo.

Landvasta programo de hidroelektra enketo estas organizita en Nov-Zelando por ke oni povu proponi certajn kaj praktikajn solvojn al la kreskanta postulado por elektra povo.

Krom la Wairakei la vizitantoj al la konferenco vidis la ĝenerejojn ĉe la Waikato-rivero, Benmore- kaj Roxburgh-on, kaj ankaŭ kelkajn el la turistaj allogaĵoj de Nov-Zelando.

Priskriboj de la fotoj

Kaj por la turisto kaj por la vizitantoj inĝenieroj Wairakei en Nov-Zelando estas timiga loko. La tuta sceno montras strangan maŝinaron kaj ŝprucantan vaporon; proksime al grupo da boraĵoj ilia bruego envolvas ĉion. De malproksime ĉi tiu bruo fariĝas nur duona muĝo kiel frapanta ŝaŭmo, kiu kreskas kaj malkreskas laŭ la vento — jen laŭta, klara kaj proksima, jen murmura kaj malproksima.

Kontraste kun ĉi tiu impresado de la regiono, kie oni kolektas la vaporon, estas la gracia kaj moderna ĝenerejo sur la bordo de kvietra rivero. De ĉi tie la uzantoj de elektra povo en Nov-Zelando akiris nunjare 491,000,000 kilovathorojn.

1) La regiono de vaporkolektado — stranga mondo de bruo kaj ŝprucanta

vaporo. Multe da vaporo en ĉi tiu foto devenas de varmega akvo, kiu eltiriĝis el la miksaĵo kiu venas supren el profundaj putoj. Ĝi estas pelata de granda premo, kaj multe el ĝi fariĝas vaporo kiam ĝi liberiĝas en la aeron per la ĝemelturaj silentigiloj montritaj ĉi tie, kiuj aperas dise sur la tereno.

2) La du ĝenerejoj ĉe Wairakei fotografitaj el la aero. Antaŭe la Waikato-rivero.

3) En ĉi tiu elera foto, farita antaŭ ol konstruado komenciĝis, artisto skizis sian impreson pri la hidroelektra ĝenerejo de Benmore. Punktita blanka linio indikas la areon de la nova lago. La nombroj indikas: (1) Monto Cook (3,775 metrojn) plej alta monto en la Sudaj Alpoj de Nov-Zelando; (2) la rivero Ahuriri apud ĝia kuniĝo kun la Waitaki Rivero; (3) Regado de elfluejoj, trajto kiu nun ŝanĝiĝis tiel ke la regopordoj estas paralelaj al la supro de la digego kaj ne flankaj, kiel montritaj ĉi-tie; (4) Elflueja ŝanelo; (5) Nova vojo al la supro de la digego; (6) Konstruo ĉe la enfluejo de la ĝenerejo; (7) Enfluaĵ tuneloj el antaŭmuldita, antaŭstreĉita betono, 5,4 metrojn laŭ diametro, kun deklivo de 35 gradoj; (8) Direktejo kaj ĝenerejo.

4) Benmore vidita el aeroplano, montranta progreson ĉe la fino de Novembro, 1962.

Enciklopedieto de Japanaj Aferoj (13)

Vortoj signitaj per * estas klarigitaj en iu el la sekvantaj numeroj.

de T. Mikami

★ **NO-O**: Klasika simbolisma dramo konsistanta el kanto, danco kaj muziko.

Noo evoluis el kelkaj malsamaj elementoj, precipe *sarugako*, kiu estis komika mimiko, kaj *dengako*, kiu origine estis danca rito por rizplantado. Dum la Heian-epoko (794-1185) ili kunmiksiĝis, kaj en la Muromaĉi-epoko (1338-1573) naskis amuzan formon ludatan per vortoj kaj gestoj. Post multaj ŝanĝoj ĝi evoluis en formon de dramo, en kiu la aktoroj vestitaj en pompa kostumo ludis en akompano de muzikiloj. Ĝin oni nomis la *sarugaka noo* kaj ĝi iĝis populara ĉe la publiko. La sarugaka noo komence konsistis el vulgaraĵoj, sed post kiam ŝintoaj jaŝiroj kaj budhismaj temploj dungis la aktorojn — okaze de festoj kaj ceremonioj — por ludigi dramojn kun religiaj instruoj kaj legendoj, ili fariĝis seriozaj.

La sarugaka noo havis kelkajn trupojn (gildojn) ĉirkaŭ Kioto. El ili, la plej prospera estis la trupo Juusaki-za (kiu poste fariĝis Kanze-za), ligita kun la Kasuga-jaŝiro en Nara. Kijocugu Kan'ami (1333-1384) de tiu trupo estis granda artisto kaj levis la sarugakan noon en vere artan formon.

La sarugaka noo de Kan'ami ricevis patronadon de la ŝoguno Joŝimicu Aŝikaga, kio multe kontribuis al la disvolviĝo de la posta noo. Motokijo Zeami (1368-1443), filo de Kan'ami, havis artistan genion ne malpli grandan ol tiu de lia patro. Estas li, kiu ellaboris la estetikajn principojn de jugeno (vd. ĉi-sube), poluris la dramverkojn de sia

patro kaj kompletigis la simbolisman sintezan scenarton de alta grado.

Post Zeami aperis aliaj noistoj: Zenĉiku (1405-1468), Motomasa (?-1432), Kōjirō (1434-1516), kaj aliaj trupoj: la Komparu-, Kongoo-, Hooŝoo-trupoj, kiuj ĉiuj estis subtenataj de la reganta ŝoguno kaj multe disvastigis la arton inter la popolamaso.

Dum la Edo-epoko (1603-1867) la noo, tiutempe nomata la *nogako*, laŭgrade disiĝis de la vivo de la popolo, kaj fariĝis proprajo de la samuraja klaso. Dum la Genroku-periodo (1690-aj) ĝi faris ankoraŭ plian evoluon kun aldono de digneco kaj soleneco al la estetika eleganteco de jugeno. La no-arto tiam estis establita en tia formo, kian ni konas hodiaŭ. En la Edo-epoko kreiĝis la kvina trupo nomata Kita. Tiel, ni havas kvin no-skolojn nuntempe: Kanze, Komparu, Kongoo, Hooŝoo kaj Kita.

No-kanto aŭ dramteksto ĉantata estas mozaiko da klasikaj beletraj esprimoj el epopeo, liriko, eposo, prozo ktp: eĉ la rakonta, monologa aŭ dialoga partoj estas en klasika stilo. (No-kanto estas nomata la *utajo* kaj konsistigas unu apartan arton de ĉantado, en kiu multaj trejniĝas sendepende de no-prezentado.)

La repertuaro de noo ampleksas ĉ. 240 pecojn, kies tekstoj, t. e. utajoj, estas plejparte verkitaj en la malnovaj tempoj de la 14-a ĝis la 16-a jarcentoj. Ili klasiĝas en du grandajn partojn: la *viziaj pecoj* kaj la *realaj pecoj*.



La no-muzikistoj de la Arta Fako de Oomoto, Kameoka. Ili estas esperantistoj: nome (de maldekstre) planktamburisto J. Umeda, genutamburisto T. Okujama, ŝultrotamburisto N. Kubota, kaj flutisto K. Deguči. Ili ĉiuj estas vestitaj en la tradicia supervesto (de daimio k. a.) nomata la *kamišimo*.

Multaj el ili estas du-aktaj (kelkfoje du-partaj en unu akto) kaj estas ludataj en tia tipa maniero, ke en la unua akto vojaĝanto vizitas provincan lokon kaj renkontas vilaĝanon. La vilaĝano rakontas al la vojaĝanto legendon de la loko, kaj fine malkaŝas, ke li estas la fantoma aperaĵo de la heroo en la legendo. En la dua akto, li manifestas sin kiel la heroo kaj rakontas la rememorojn pri antikva tempo kaj prezentas dancon. La rolon de vojaĝanto en la unua akto kaj tiun de la heroo en la dua akto ludas la Ĉefaktoro (unu sama aktoro); la rolon de vojaĝanto ludas la Vicaktoro por enkonduki la publikon en dramon per prologo. En la 'realaj pecoj' la aktoroj rolas historiajn personojn.

Pli detale, ili subdividiĝas en kvin kategoriojn:

1) *Diaj pecoj*. En la unua akto, dio aperas en la formo de viro kaj rakontas al vojaĝanto (ŝintopastro, ministro aŭ oficisto) legendon, kaj en la dua akto li figuras kiel la dio, prikantans pacon kaj prosperon de la lando kaj prezentas festan dancon.

2) *Batalaj pecoj*. En la unua akto venas vilaĝanoj, kiuj rakontas al vojaĝ-

antoj la okazintaĵojn de la loko en antikva tempo; en la dua akto ili figuras kiel la iamaj nobeloj aŭ samurajoj kaj priskribas la tragikan finon de sia vivo sur la batalekampo.

3) *Perukaj aŭ virinaj pecoj*. En ili, viraktoro uzas perukon por ludi virinan rolon: ofte la rolon de bela junulino kaj kelkfoje tre maljuna virino, kiu prezentas gracian dancon. Alifoje, la spirito de planto, ekzemple de tre grandaĝa sakura arbo, aperas en la formo de virino aŭ viro, kaj dancas elegantan dancon. En tiuj ĉi romantikaj pecoj la idealoj de noo manifestiĝas en plej alta grado.

4) *Lunatikaj pecoj, venĝofantomaj pecoj kaj realaj pecoj*. En la lunatikaj pecoj aperas frenezulo aŭ frenezulino, plejofte kiel la patrino perdinta sian infanon aŭ la virino trompita de viro. En la venĝofantomaj pecoj aperas la spirito de virino havanta venĝosenton kontraŭ viro, kiu perfidis ŝin, aŭ de viro malamanta virinon, kiu estis malfidela al li. Temas ankaŭ pri ĵaluzo kaj aliaj pasioj. En la 'realaj pecoj' la aktoroj ludas la rolon de 'realaj homoj' historiaj aŭ fikciaj, sed ne aperas iliaj spiritoj kiel en la viziaj pecoj.

5) *Lastaj pecoj* (prezentataj ĉe la fino de la programo). En ili aperas demonoj, monstroj aŭ ĉiaspecaj nehomaj spiritoj, kiuj prezentas rapid-taktajn dancojn.

Unu plena programo de noo por formala okazo konsistas ĝenerale el kvin pecoj elektitaj el la supraj kategorioj kun aldono de tri pecoj de kĵogeno (farso). La tuta programo daŭras de mateno ĝis vespero.

No-danco estas simbolisma, kaj tre malrapida se oni komparas ĝin kun baleto en la Okcidento. Laŭforme dirite, ĝi konsistas ĉefe el la movoj antaŭen

aŭ malantaŭen de la aktoro kun la plando de la piedo ĝenerale tenata sur la planko: eĉ kiam li paŝas, liaj piedoj ne leviĝas for de la surfaco de la planko, sed kvazaŭ-glite paŝas. Krom oftaj piedfrapoj por emfazi la ritmon de danco ne troviĝas aliaj piedmovoj. La kapo havas fiksitan teniĝon, escepte la okazojn por rigardi flanken, supren aŭ malsupren. La supra parto de la korpo estas fiksita rekte kaj senmove; la brakoj estas tenataj en difinita pozicio kaj ilia movo estas preskaŭ ĉiam akompanata de la antaŭen- kaj malantaŭeniĝo de la piedoj. Ĉiu moveto de la membroj havas simbolan signifon. Resumite, ĉiuj movoj, pozoj kaj gestoj estas kalkulitaj, studitaj kaj alte stiligitaj en la abstraktaj formoj, kiuj estas idesugestaj. Tiuj formoj estis elfaritaj per longa tradicio kaj ilin neniu aktoro povas malobservi. Sed sur la bazo de la tradiciaj formoj ĉiu aktoro elmontras sian talenton — kreeme. (La danco konsistigas unu apartan fakon, kiu estas nomata la *ŝimajo* kaj en kiu oni dancas kun akompano de utajo sed ofte sen muziko.)

No-muzikiloj konsistas el fluto, ŝultrotamburo (manfrapa), genutamburo (manfrapa) kaj planktamburo (frapsonigata per du lignaj bastonetoj). El ĉiuj, nur la fluto ludas arion kaj la aliaj estas perkutinstrumentoj, kiuj donas takton sed ne melodion. Ili ne povas produkti la kompleksan sonkombinon kiel en okcidenta orkestro, sed celas eligi simplajn sonojn konformajn al la no-simbolismo.

No-scenejo estas sur podio unu metron alta kaj ses kvadratmetrojn vasta. Ĝi elstaras en la mezon de la salonego kaj havas kvar angulajn kolonojn, kiuj subtenas la frontonan tegmenton, similan al tiu de jaŝiro.



La No-scenejo: "Suidō-baŝi No-teatro" en Tokio

Sekve, oni rigardas la scenon de tri flankoj kaj no-ludo aperas ne kiel bildo de unu dimensio kiel en alia teatro, sed ĝi alprenas tridimensian karakteron. La scenejo ne havas kurtenon, kian oni trovas en ĉiu alia teatro.

La dekstra flanko de la scenejo (ĉiam el la vidpunkto de la fronta rigardantaro) havas verandan etendaĵon kun balustrado, nomatan la *Ĉantejo*: ĝi fakte estas Ĥorejo, kie sidas Ĥoranoj.

Post la scenejo troviĝas ankoraŭ tri metrojn vasta spaco, nomata la *Postŝido*: ĝi fakte estas Muzikejo, kie sidas muzikistoj kaj ankaŭ sufloroj. Sur la fona kuliso (lignomuro) nomata la *Spegulpanelo* estas pentrita la larĝa bildo de dignoplena maljuna pinarbo laŭ la Kano-skolo de la pentrarto. Sur la dekstra-flanka lignomuro de la Muzikejo estas pentrita la bildo de kelkaj bambuoj. En la malsupra parto de tiu lignomuro troviĝas 'flanka pordeto' tra kiu en- kaj eliras Ĥoranoj kaj sufloroj.

Maldekstren de la Muzikejo etendiĝas tri metrojn longa koridoro, nomata la *Scenponto*. Ĝi kondukas al 'antaŭĉambro' nomata la *Spegulĉambro*, kie aktoroj kaj muzikistoj finpretigas sin ĵus antaŭ la eniro sur la scenejon. La Scenponto kelkfoje estas utiligata kiel parto de la scenejo. Ĉe la fino de la Scenponto, de kie aktoroj kaj muzikistoj elvenas, pendas kurteno de kvin koloroj, kiun oni levas per du bambubastonetoj kiam ili pasas. Tial tiu kurteno estas nomata

la *Levkurteno*.

Ĉirkaŭ la tuta scenejo kun la Scenponto estas borderita sur la grundo per iom da ŝtonplena spaco, kiu izoligas ilin de la publiko. En la ŝtonplena spaco laŭlonge de la Scenponto estas plantitaj tri pinoj. Ili estas nomataj — de dekstre maldekstren — la Unua, Dua kaj Tria Pinoj. Ili servas ne nur kiel dekoraciaĵoj sed ankaŭ kiel la poziciaj markoj, laŭ kiuj la maskitaj aktoroj reguligas sian movadon.

No-aktoroj apartenas al jenaj grupoj:

1. La ĉefaktora grupo, kiu konsistas el ĉefaktoro kaj liaj (kelkaj) *kompaniuloj*.

2. La vicaktora grupo, kiu konsistas el vicaktoro kaj liaj (kelkaj) *kompaniuloj*.

La sukceso aŭ malsukceso de no-ludo dependas de la Ĉefaktoro: ĉiuj aliaj estas subroluloj, kiuj ludas por sukcesigi lian ludon. Eĉ la Vicaktoro diferencas de la antagonisto en aliaj formoj de dramo. Kiam la Ĉefaktoro komencas sian dancon, la Vicaktoro retiriĝas al angulo de la scenejo. Alia diferenco inter ambaŭ estas, ke la Ĉefaktoro ofte portas maskon por personigo de la heroo, dum la Vicaktoro neniam, ĉar ĉi tiu reprezentas la publikon. Kelkaj no-ludoj estas prezentataj nur de tiuj du aktoroj.

3) La farsaktora grupo, kiu konsistas el kelkaj membroj. Tiu ĉi grupo havas du funkciojn en noo. Unue, ili ludas farson nomatan *kjogeno* inter no-ludoj, simile kiel en la antikva greka teatro. Tial ilia ludo estas nomata la *interluda kjogeno* aŭ simple — *intermezo*. Due, ili sin prezentas en no-ludo kaj partoprenas ĝin. Ili faras rakonton en formo de monologo aŭ dialogo, kaj tiel donas al la spektantaro la necesan scen-klarigon, aŭ al la Ĉefaktoro la tempon por ke li ŝanĝu sian kostumon por la dua

parto aŭ akto — aŭ por nova ludo. La farsaktorojn oni povas facile distingi, ĉar ili portas flavajn tabiojn* (piedvestojn), dum ĉiuj aliaj portas la blankajn.


No-muzikistoj estas la ludistoj de fluto, ŝultrotamburo, genutamburo kaj planktamburo. Ĉiu el ili estas vestita en la ceremonia blazonita kimono (vd.) kaj surmetas la klasikan du-pecan kompleton, kiu estas nomata *kamiŝimo* kaj kiu konsistas el ŝultrovesto kaj hakamo (vd.).

Ĥoranoj kantas ĉefe la rakontajn partojn de la no-teksto. Ilia nombro ne estas fiksita, sed ĝenerale: de ses ĝis dek du. Ĉiu el ili estas vestita en la ceremonia blazonita kimono.


Maskoj. Unu karakterizaĵo de la noo estas la uzado de diversaj maskoj. Sekve la aktoro bezonas nenian ŝminkon kaj povas ludi ĉiaspecajn rolojn — eĉ de supernaturaj estaĵoj. En tiu ĉi rilato la noo denove similas al la klasika greka dramo. Tiuj el la maskoj, kiuj postrestas el la 14-a jarcento estas la plej valoraj. Tiuj faritaj en la Edo-epoko (1603-1867) estas grandparte imitaĵoj de tiuj klasikaj maskoj kaj malpli valoraj. La arto de maskofarado komparebla al tiu de la malnova tempo jam formortis.

Kostumoj. La no-kostumoj estas brod- kaj aliaj luksaj teksaĵoj. Ĉar la noo tute ne celas al realismo, la kostumoj ne pretendas reprezenti la personon en la rolo. Samurajo iranta al la batal-kampo ne estas vestita per kiraso; almozulo foje estas vestita en pompa robo, ktp.

Dekoracioj. La scenejaj dekoracioj ne estas uzataj, escepte kelkajn simplajn objektojn, kiuj simbolisme reprezentas diversajn aferojn (domegon, sanktejon, montaron, maron, ktp.) Cetere, ĉiu aktoro portas *sensuon** (faldeblan vent-



No-maskoj el la 14-a jarcento. De maldekstre dekstren: 1) legenda estulo, 2) virino, kiu en 2-a akto fariĝas monstro k. a., 3) amo- aŭ karmosuferanta virino, 4) venĝofurioza virino. (En konservo de la Hooŝoo-skolo)



Danco en "La Flugrobo" (Hooŝoo-skolo)

umilon), kiun li uzas en plej diversaj manieroj; ekzemple kiel glavon, sagon, sake-tason ktp. laŭ la cirkonstancoj.

Kun la scio pri la supre menciitaj aferoj ni nun iom vidu, en kia ordo noo prezentigaŝas.

Ĵus antaŭ la komenciĝo de no-ludo la publiko aŭdas eksonadon de fluto kaj tamburoj, kiu venas el tra la Levkurteno. Tio signifas, ke la muzikistoj agordas siajn instrumentojn en la Spegulĉambro. Baldaŭ la Levkurteno estas malfermita kaj malrapide elpaŝas tri aŭ kvar muzikistoj unu post alia, portante sian muzikilon: unue, la flutisto, due la ŝultrotambura ludisto, trie la genutambura ludisto, kvare la planktambura ludisto. (Kiam la planktamburo ne estas uzata, la nombro de la muzikistoj estas tri.) En tiu menciita ordo ili sidiĝas en la Muzikejo — kun la flutisto plej dekstre. La ludistoj de ŝultrotamburo kaj genutamburo sidas sur taburetoj; la flutisto

kaj la planktamburisto sidas sur la planko. Aliflanke, la ĥoranoj venantaj el la 'flanka pordeto' sidiĝas en du vicoj en la veranda ĥorejo. Meze de la malantaŭa vico sidas la Ĥorestro.

La eniron de la aktoroj akompanas muziko. La Ĉef- kaj Vicaktoroj estas akompanataj respektive de siaj Kompaniuloj kaj, se necese, de kelkaj Farsaktoroj.

Ĉi tie ni revenu al la priskribo pri la kvar kolonoj de la scenejo kaj notu, ke ĉiu el ili havas propran nomon. Kiam aktoro venas de la Scenponto kaj eniras la scenejon, la unua kolono, kien li alvenas, estas nomata la Ĉefaktora Kolono, ĉar apud ĝi staras ĉiam la Ĉefaktoro antaŭ ol li komencas sian ludon. La alia kolono en la sama flanko sed en la fronto de la scenejo estas nomata la Vidmarka Kolono, ĉar ĝi estas uzata de la maskita aktoro por scii sian pozicion. La tria kolono — dekstra en la fronto — estas nomata la Vicaktora Kolono, ĉar

La Flugrobo

de Kanze-skolo

unu el la kvin pecoj

de la festa programo,

respektive prezentitaj

de la **Kvin No-skoloj**

por


la **Sepdekjara Jubileo de Oomoto**

ĉe la No-salono de Oomoto,

Kameoka

18 novembro 1962

1. *La fiŝisto* (vicaktoro) *prologas.*
2. *La ĉielanino* (ĉefaktoro) *ĉagrenigas sen laflugrobo.*
3. *Ŝi ĝojas kun laflugrobo redonita de la fiŝisto.*
4. *Ŝi dancante la ĉielan dancon foriras.*



tien la Vicaktoro ĉiam retiriĝas tuj kiam li finis sian parton. La kvara kolono estas nomata la Flutista Kolono, ĉar apud ĝi sidas la flutisto en la Muzikejo.

Kutime, la unua, kiu eniras la scenejon, estas la vicaktoro, kiu — egale ĉu li enpersonigas ŝintopastron, ministron, samurajon, vilaĝanon aŭ iun alian, li ĉiam reprezentas la publikon kaj deklamas prologon per kanto. Kiam li finas ĝin, la ĥoro recitas ĝin en malalta voĉo. Poste li anoncas sian nomon kaj klarigas la kaŭzon, kial li aperis. Se li ludas la rolon de vojaĝanto, li kante rakontas pri sia vojaĝo, kaj la fino de lia kanto indikas, ke li atingis la celon de sia vojaĝo.

Alia kanto akompanas la postan eniron de la ĉefaktoro. En la mezo de tiu muziko li venas sur la Scenponto ĝis la Unua Pinarbo, kie li kantas sian prologon en akompano de muziko. Kiam li eniras la scenejon, komenciĝas dialogo kun la Vicaktoro...

Por pli bone kompreni la funkciadon de la no-konvencioj, ni rigardu unu gracion noon titolitan "La Flugrobo" el la 3-a kategorio (vd. supre).

Meze de la scenejo staras pino kiu reprezentas la pinaron sur la marbordo de Miho. Eniras la vicaktoro en rolo de fiŝisto, akompanata de liaj du kompaniuloj ankaŭ kiel fiŝistoj. Li recitas kanton, per kiu li laŭdas la belan veteron de la printempa tago kaj la pitoreskon de la marborda panoramo. Subite li trovas belan robon pendantan sur la pinarbo. Kiam li ĝojplene volas ĝin hejmenporti, la ĉefaktoro en la rolo de ĉielanino, ekparolas el la alia flanko de la Levkurteno por peti ke li ne forportu ĝin ĉar sen ĝi ŝi neniam povos reiri al la Ĉielo. Baldaŭ ŝi venas sur la scenejon kaj petas redonon de la robo. Sed la fiŝisto ne volas redoni ĝin, dirante ke se

ĝi estas ĉiela robo, li faros ĝin hejma trezoro. Tio pelas ŝin en deprimon. Vidante ŝin treege ĉagrenita, la fiŝisto ekkompatas ŝin kaj preskaŭ volas redoni la robon. Nun sekvas jena dialogo:

Fiŝisto: *Sed momenton!*

*Mi iam aŭdis parolon pri danco
kiun dancas ĉielanoj.
Se vi ĉi tie montros
tiun arton nun por mi,
mi do al vi redonos
la robon certe.*

Ĉielanino: *Ha, mi ĝojas!*

*Per ĝi mi jam supren povos
reiri en ĉielon facile.
Pro ĝojo nedirebla
kaj kiel memoron,
mi kial ne prezentu dancon
por homa plezuro,
esperante ke ĝi restos
inter la homoj
de l' mondo kaj eterne
konsolos ilin!
Sed sen la robo
mi estas vana birdo
sen ĉe flugilo;
mi tial petas
unue la flugrobon.*

Fiŝisto: *Nu ne! Se mi redonos
unue l' robon,
mi timas ke vi iros
en la ĉielon,
lasante min ĉi tie
sen vidi dancon.*

Ĉielanino: *Ne, vi nur devas scii:
suspekto estas homa,
mensogo ne ekzistas
en la ĉielo.*

Fiŝisto: *Mi sentas min tre honta!
Jen do vi prenu.*

Speciala Avizo

**Ĉiuj partoprenantoj de la 50-a U. K. en Tokio (1965),
post la kongreso, havos la okazon vidi kaj apreci la
Esperantolingvan no-prezentadon de *La Flugrobo* ĉe la
No-salono de Oomoto, Kameoka.**

La Arta kaj Esp-a Fakoj de Oomoto

La fiŝisto fine redonas la flugrobon al la ĉielanino. Ŝi surmetas ĝin kaj dancas. Kaj dancante ŝi pli kaj pli "malproksimiĝas en la nebulon super Monto Huĵi" ĝis ŝi atingas la finon de la Scenponto, kiam la ludo finiĝas. La ĉefaktoro indikas la finon de sia prezentado per piedfrapo sur la planko. Sed kelkfoje li malaperas post la Levkurtenon ankoraŭ dancante, kaj en ĉi tiu okazo la vicaktoro venanta ĉe la Ĉefaktora Kolono frapas la plankon per piedo. ("La Flugrobo", verko de Zeami, daŭras 1¼ horojn en no-prezentado, kaj duon-horon en la ĉantado de utajo.)

Kiam la aktoroj forlasas la scenejon, ili foriras en la ordo de la Ĉefaktoro, la Vicaktoro kaj la kompaniuloj. Ili reiras al la Spegulĉambro laŭ la Scenponto, dum la Ĥoranoj foriras tra la 'flanka pordeto'. La muzikistoj retiriĝas tra la Scenponto en la sama sinsekvo kiel ĉe la eniro. Neniu aplaŭdo nek akklamado okazas je la fino.

El la supra skizeto pri "La Flugrobo" oni vidas, ke la noo estas la baletoj aŭ operoj de Japanujo, kies ĉiuj formoj kaj ecoj estas orientaj. Sub tia kompreno, ĝi similas kelkfoje ankaŭ al pantomimo. Sed ĉiokaze, ĝi evitas ĉiun

vulgaran aludon al la realo, celante krei la specialan mondon de belo, kiu estas aŭ majesta aŭ solena aŭ digna aŭ eleganta. Aparte la nocio pri eleganteco en noo estas nomata *jugeno*. Kiel no-termino, ĝi signifas la subliman senton de "profunda" beleco aŭ gracieco, kiun noo estigas en la homa animo per la harmonia tuto de la koncentrita ago de la aktoro kaj la akompanantaj vortoj kaj muziko. La jugena eleganteco estas ne-reala, t.e. *arta* en la plej "profunda" senco de la vorto. Per tiu nereala beleco noo sorĉas nin en la mistikan aŭ misteran mondon de la Pratempe aŭ de la Mezepoko aŭ de la Spiritoj. La manko de realismo necesigas la komprenon pri no-konvencioj kaj superan imagpovon de la spektantaro: ĉi tiu bezonas viziĝi al si multajn sinsekvajn scenojn pere de la vortoj recitataj ktp. El tio sekvas, ke japanoj sen klasika instruiteco ankaŭ ne povas pli multe kompreni, nek ĝui la spiriton de la ludo ol eŭropanaj turistoj. Sed la Arto estas universala. Nur poetoj kiel Ezra Pound kaj W. B. Yeats — se ne citi aliajn nomojn — iugrade sed mirinde penetris ĝian spiriton. (Vd. JUGENO)

Leteroj al s-ino D. M. Worcester

S-ino Worcester ricevis kaj ricevas tre multajn leterojn de la japanaj esperanto-kursanoj el diversaj lokoj, kiujn ŝi gvidis dum la "kunloĝado" ne nur ĉe la Oomoto-Centro, Kameoka, sed ankaŭ en aliaj urboj. Al ŝi ni petis tri leterojn por publikigo, esperante ke ili mem parolos pri ŝia ĉiam gaja kaj efika instruado de nia lingvo al japanaj komencantoj.

Redakcio

*

Estimata samideano,

Kiel vi fartas post la kunvivado?

Hodiaŭ la fotografiaĵoj estas faritaj,

do mi rapide sendas ilin al vi.

Kaj bonvole transdonu duonon de tio al s-ino Edna M. Cox, mi petas.

De tempo al tempo, mi rememoras la pasintajn ĝojajn tagojn de la kunvivado, per ĉi tiuj fotografiaĵoj.

Vi forte impresis min pro via bona, facila, kaj lerta instruado de esperanto.

Mi neniam forgesos vian gvidon.

Dank' al vi, mi akiris pli altan kapablecon en esperanto; nun mi povas skribi tiel bone.

Iam mi volas viziti eksterlandon nur per esperanto. Tio estas mia sonĝo.

La 17-an de marto 1963 okazis esperantista edziĝofesto en la Oomoto-domo, Kameoka. La novaj geedzoj estas s-ro Tacuo Hujimoto (27-jara) kaj f-ino Masumi Mijauĉi (24-jara). Ili unuafoje interkonatiĝis antaŭ du jaroj en Somera Disciplinado por Esp-parolkapablo, ĉe kiu s-ro Hujimoto gvidis la fraŭlinon kiel unu el la multaj gekursanoj. Jen pruvo, ke nia lingvo estas Edzperanto — por prunti ŝvarcan esprimon.

La feston partoprenis ĉ. 50 gesamideanoj el Kansai- kaj aliaj distriktoj, krom la gepatroj kaj parencoj de la nova paro. Por soleno, la geedzoj staris antaŭ la biombo sur kiu staris la portreto de d-ro Zamenhof kaj juris sian amon per mano metita sur *La Fundamento de Esperanto*. La soleno kaj festeno daŭris

Esperantista Geedziĝo



tri horojn. Dum la tuta tempo Esperanto estis la sola lingvo parolata. Pri tiu ĉi ankoraŭ malofta maniero de geedziĝa festo per Esperanto faris raporton unu el la plej influhavaj ĵurnaloj en la lando.

Fotoklarigo: La nova paro ĵuras amon per Esperanto.

Do ĝis la revido.

tute via

Jukijoŝi Muramacu

Musaŝinoŝi, Tokio

*

Kara Amikino,

De kiam vi foriris al via urbo jam kelkaj tagoj pasis. Kiel vi fartas? Mi fartas tre bone. Nun mi skribas longan leteron kiel mi promesis.

Unue mi kore dankas pro via superhoma energio kaj samtempe mi estas tre kortuŝita de via ĝentila karaktero kaj lerta instruarto.


Vi estas ĉiam hela kaj klara. Vi neniam malĝojigis. Krome vi estas humura kaj tute ne enuigis nin. Vi estas eble plej bona sperta "aktorino" en la mondo, mi pensas!

Via rekta metodo sen japana lingvo estis tre efika. Plie vi ĉiam skribis, skribis, skribis. Mi tre hontas pri mia mallerteco en instruado de esperanto en nia kurso. Gelernantoj ne uzis manojn kaj brakojn. Ili nur movis siajn okulojn de dekstre maldekstren kaj reen.

Via supera karaktero kaj fervoro kaj lerta instruado intensigis ĉe ni la lernadon de esperanto. Via superhoma laboro kaj klopodo surprizis nin. Dum du horoj da ĉiuvespera kurso vi ne trinkis eĉ unu tason da teo, kaj ofte alvokis nin por skribi vortojn kaj frazojn sur la nigra tabulo. Kiel vi maljunulino povas havi tielan energion?

Mi sciis esperanton antaŭe sed mia esperanto estis tute neutila. Ĉi tiun fojon mi eksciis la kialon. Tio estis timo, timo, timo. Krom tio mi trovis, ke gravajn vortojn unue ni devas elparoli, ĉar en esperanto la ordo de frazoj ne estas fiksita. Tiel mi havis tre grandan rikolton.

Denove mi elkore dankas vin. Kiel ni ĝuis la kurson de vi! Ĉiuvespere mi rememoras la ĝojan kurson, kiun vi



Modelo de l' baldaŭ starigota Esperanto-Monumento en Linz, Aŭstrujo, sub iniciato kaj aranĝo de s-ano Joh. Geroldinger. La monumento estos el aluminio kaj 2,5 m. alta.

gvidis. Nun mi finas mian leteron kun bondeziro al vi.

Sincere via

Masaki Imai

Hukuoka, Kjuŝu

*

Estimata S-ino Doris M. Worcester,

Ĉiam mi elkore respektas vian grandan laboron por Esperanto. Mi bone memoras lecionon, kiun mi ricevis en Kameoka. Tamen mi hontas, ĉar mi ankoraŭ ne povas esprimi min per Esperanto libere.

Antaŭ kelkaj tagoj mi legis vian vojaĝo-programon en la ĉi-monata n-ro de Oomoto, kaj mi kore gratulas vin pri tio.

Mi elkore preĝas, ke en la longa vojaĝo dum unu jaro, ĉiam vi estu sana kaj humora, kaj post la vojaĝo mi atendas revidi vin en ĉi tiu lando.

Kun koraj salutoj

(S-ino) Tokuko Kuroda

Parolas niaj legantoj

★ S-ino *Yvonne Privat*, Neuchatel, Svisujo

En la numero de Oktobro-septembro 1962 de via gazeto mi legis la tre kortuŝan artikolon de kondolo pri la forpaso de mia kara edzo Prof. D-ro Edmond Privat, honora prezidanto de U.E.A. kaj viajn vortojn de simpatio adresitajn al mi. Estu, mi petas, kore dankata pro tio.

Se mia edzo, korpe, ne plu estas inter ni, mi scias ke lia spirito daŭrigas inspiri ĉiun ardan aspiron al paco kaj unueco de la homaro.

Pro tio, la aperigo de lia lasta mesaĝo al vi, okaze de la 70-jara jubileo de Oomoto, en via ŝatata gazeto, estis dolĉa konsolo al mia granda peno.

Bonvolu akcepti miajn proprajn bondezirojn. Tutkore kaj samideane via.

★ *W. H. King*, 23 Burch Street, Mount Albert, Auckland, S. W. 2, Nov-Zelando

Mi ne dubas pri la plifortigo de la administracio per la plej lastaj aranĝoj. Ankaŭ mi gratulas la Centron pro la nova Domo, laŭ la belaj fotoj en Sept-Okt. numero de la revuo. Post du jaroj mi esperas vidi la novan centran Doman, ĉar, eble vi scias, mi celas veni al Japanujo por partopreni la 50-an U. K. de Esperanto; kaj sendube mi revizitos Kameoka kaj Ajabe por revidi antaŭajn geamikojn. Mi kredas, ke nun aliaj oficioj ĉe la centro kaj Sandai-sama* mem studas Esperanton. Estos ĝojo interparoli kun ili kaj kun Sandai-sama en la belaga Internacia Lingvo.

En la sama revuo, mi kun plezuro vidis foton de la 48-a Japana Esperanto-

Kongreso kaj inter la multaj gekongresanoj miajn amikinojn, s-ino Worcester kaj s-ino Cox. Ŝajne, Esperanto bone progresas kaj la gesamideanoj bone preparas por la 50-a U. K. de E.

Pri mia laboro por Oomoto mi sciigas al vi.

Mi jam aplikis al la Rezerva Banko de Nov-Zelando ĉe Auckland, por permeso transsendi al vi la senrabatan sumon, kiun mi havas por la Oomoto-Centro, sed la banko rifuzis. Tuj mi skribis al la bank-guberniestro ĉe Wellington por peti rekonsideron. Mi sendis al li ekzempleron de la revuo OOMOTO kun tradukoj de la rubrikoj kaj klarigis, ke la revuo estas internacia, pacama, kultura kaj eduka, ankaŭ religia. La guberniestro sendis mian leteron kaj la revuon al la Auckland-Filio, kiu fine donis al mi la postulitan permeson sendi al Kameoka, kiom estus sufiĉa por tiu ĉi jaro. Tamen, la plej bona sukceso kuŝas en la fakto, ke mi establigis la rajton transsendi al la Oomoto-Centro abonojn sen ia malfacilaĵo. Krome, mi povis montri al la bank-oficistoj ekzempleron de nia Oomoto-revuo kaj per ĝi elmontri, ke Esperanto vere funkciadas en la praktiko.

Mi jam anoncis min al la UEA-Ĉefdelegito por N. Z. kiel FD (Oomoto aferoj) ĉe Auckland. Mi sugestas al la Centro, ke konsilinde estas enketi pri la ebleco same enoficigi kiel FD Oomoto-perantojn kaj gelegantojn en aliaj mondpartoj. Laŭ la UEA 1962 Jarlibro (paĝo 432) ne estas aliaj FD por Oomoto-aferoj;

kaj mia nomo estos la unua aperigi en la Jarlibro — espereble sufiĉe frue por la 1963 Jarlibro. Per tio, Oomoto troviĝos inter la UEA Delegitaro.

Jen mia agado de post mia lasta letero. Ĉiame estas plezuro helpi laŭeble la Oomoto-Societon kaj ties laboron por la plibonigo de la homaro.

Mi plenkore reciprokas vian saluton kaj bondeziraron; ankaŭ mi salutas kaj bonvolas al Sandai-sama, s-inoj Worcester kaj Cox, kaj al la multaj geamikoj ĉe vi. Al Tazuo Nakamura (kiun mi interkonis persone en Kioto) mi kore gratulas pro lia promocio al Akademiano. Pro tio, mi tre ĝojas; ankaŭ pro la elekto de d-ro Jagi al la UEA prezidanto. Lastafoje, ke mi interparolis kun li, estis ĉe la 46-a U. K. de E., en Harrogate.

La Red. — S-ro King estas unu el la landaj reprezentantoj de OOMOTO. Por ni estas granda plezuro havi en li tiel simpatiplenan kaj sindonan kunlaboranton, kiu persiste varbadas abonantojn por nia revuo kaj lastatempe — post trabato al teknika malfacilaĵo — sukcesis ebligigi la transsendon de mono al ni.

Por meriti la afablan penon de s-ro King kaj la ĉiaman kunlaboron de aliaj gesamideanoj, ni estas kun la renovigita rezolucio ĉiam pli bonigi la enhavon de nia revuo kun valoraj kontribuoj el la Oriento kaj el la Okcidento.

★ S-ro *C. D. A. Capp*, Londono. (al T. Mikami)

Kun aparta intereso mi legis vian artikolon “Budho — Buddo — Budao” en Oomoto 267/268. Mi ĝojas, ke vi publike esprimis vian finan decidon, ĉar sendube multaj ŝanceliĝas inter la du formoj *Budho* kaj *Budao* (neniam plaĉis al mi la

formo *Buddo*). Viaj argumentoj estas miaopinie tre trafaj kaj de nun mi uzos la formon Budho — formon al kiu, ĉiuokaze, mi inklinas, sed iam timis, ke eble ĝi estas tro eŭropeca. En mia traduko (kiun cetere mi devis fari tre rapide sen ebleco de polurado) de “Oriento kaj Okcidento — al reciproka kompreno”*) mi uzis la formon *Budao* parte pro tio, ke tiu formo troviĝas en P. V. kaj parte pro via unua konsilo. Estas ja esence, ke ni parolu per unu voĉo; feliĉe rilate al Kristo la normo jam fariĝis Jesuo kaj oni nuntempe malofte vidas la formon Jezuo. Mi alte taksas vian opinion pri la nomo de la Iluminiginto.

Via “Enciklopedieto de Japanaj Aferoj” estas tre valora kontribuo al nia vortprovizo. Vi jam aparte eldonis unu artikolon (“Kio estas tankao?”) sed mi esperas, ke fine la tuta serio estos aĉetebla kiel broŝuro.

★ S-ro *M. C. Butler*, Surrey, Anglujo

Mi ne pretendas kompetenton. Tamen “malsaĝulo aŭdacas enkuri tien, kie anĝelo timas treti”. Eble la demando pri “Sojo, Sojfabo” (Oomoto p. 183) fontas el la fakto, ke la vortoj *fabo*, *pizo*, (Angle: *bean*, *pea*) uziĝas plursence. La vorto *fabo* (*bean*) povas nomi (a) la planton *Faba* (*broad bean*); (b) ĝian semon; (c) similan planton aŭ semon. Ekz. *fazeolo* (*Phaseolus*) (*kindney*, *butter*, *haricot*, *French*) bean. Simile, la vorto *pizo* (*pea*) povas signifi la planton mem (*Pisum*); (b) ĝian semon; (c) similan planton aŭ semon. Ekz., latiro (*Lathyrus*), (*everlasting*, *sweet*, *pea*); kikero (*Cicer*) (*chick pea*).

Simile, la vorto “sojo” povas signifi (a) la planton mem (*Soja*); (b) ĝian semon (soja fabo, soja semo) (*soy-bean*,

* Japana nommaniero por s-ino Naohi Deguĉi, la nuna Gvidantino de la Oomoto-movado (Noto de la Red.)

*) Elangligis C. D. A. CAPP; eld. de UEA kun helpo de UNESKO, 1962. 50 p. kaj 8 tutpaĝaj fotoj (21.5×13.5 cm). Prezo: 1.50 gld. (6 steloj). — Noto de la red.

Reprezentantoj de "Oomoto"

Ni prezentas ĉi-sube la liston de niaj reprezentantoj,
al kiuj oni povas pagi abonkotizon.

- Aŭstralio...S-ro F. R. Banham, 31st Andrew's Avenue, Heidelberg N. 22, Victoria
Brazilo.....F-ino Nelva Ribeiro, Rua Olegário Maciel, 232, Uberlândia, MG
Britujo.....D-ro A. Mildwurf, 71 Compayne-Gardens, London N. W. 6.
Bulgarujo...S-ro Atnas Nikolov, Str. IV Asen, II 28, Sofia
Ĉeĥoslovakio...S-ino Cichová Jana, Praha 9, u Svobodarny 12
Danujo.....S-ro Ib Schleicher, Ved Bellahøj 30, B-Kopenhago BRH
Francujo...S-ino Renée Volpeliere, Ul. 2018, 10 rue de la Servie, Nimes (Gard)
Germanujo...S-ro F. Moravec, Flensburg-Murwik, Twedterholz 15
D-ro Tadros Megalli, München 8, Schliessfach 133
(DDR).....S-ro Albert Klemm, Schwarzburger Strasse 5, Bad Blankenburg
(Thür, Wald)
Hindujo...S-ro R. B. Joshi, H. No 297-A, Gangapuri, Wai, Dist. Satara,
Maharashtra State
Hispanujo...S-ro José L. Aldeguer Jaén, Torrente Vidaret 38-40, Barcelona
Hungarujo...D-ro Balla Ignác, XIV, Nagy-Lajos, k. u. 203, Budapest 14
Italujo.....S-ro Giovanni Della Savia, Via Monte Focobon, 8, Favaro Veneto
(Venezia)
Izraelo.....S-ro Ben-Alter Jehiel, Meonoi Ovdim 31, Petah-Tikva
Jugoslavio...S-ro Jedjini Martin, Djure Djakovica 11/I, Subotica
Kanado.....S-ino Vilma Eichholz, Esperanto-domo, P. O. Box 344, Oakville,
Ontario
Maroko.....S-ro Thollet Charles, 64 rue des Ecoles, Kénitra
Meksikio...S-ro José Serrano L., Central de Talabareros 72, Col. E. Carranza,
Meksiko
Nov-Zelando...S-ro W. Hudson King, 23 Burch Street, Mount Albert,
Auckland, S. W. 2
Svedujo...S-ro Sigvard Håkansson, Wenströmsvägen 10, Stockholm No.
Usono.....S-ino Catherine L. Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, Calif.

soy-bea). Ŝajnus plej klare paroli pri *sojo* (= la planto); (*the soy-bean*): *sojaj faboj* (= la sojaj semoj) (*soy beans*); kaj *soja saŭco* (= la saŭco) (*soy*).

Tamen pri (b) kaj (c) oni ankaŭ povus diri mallonge, konversacie, sojoj, soj(aj)o.

Noto de T. M. — Estas malfacile decidi, kiu estas malsaĝulo kaj kiu estas anĝelo en ĉi tiu problemoj kiel en multaj aliaj. Mi rekonas la uzmanieron de *sojo* en la angla kaj franca lingvoj (en A ĝi signifas la planton aŭ la semon, dum

en F nur la planton (laŭ la *Petit Larousse*). Kaj mi volis montri: 1) tiu vorto — sendepende de la uzmaniero en okcidentaj lingvoj — povas signifi nek la unu nek la alian, sed nur la saŭcon (same kiel *vino* ne signifas viton, nek vinveron, sed nur la trinkaĵon!); 2) la scienca nomo kun *Soja* en la japana fakvortaro (jam citita) ne kondukas al la ĝusta specio de planto, el kiu oni produktas la sojon = saŭcon.

Mi atendas aliajn anĝelojn — aŭ saĝulojn salti en la terenon.